

# CINIO

中國新報

6

1997

ISSN 0032 - 4361

50 JAROJ DE  
AŬTONOMEKO EN INTERNA  
MONGOLIO



*Kiel korekte  
prononci en Esperanto  
Sankaja Muzeo*



**Flugado**

*Foto de SUN SHUQING*

## **INTER NI**

Mi jam enkadrigis la belan papertondaĵon senditan de vi... Laŭ mia opinio, Esperanto vere taŭgas por mondlingvo, ĉar ĝi estas facile lernebla. Miaj okuloj malfortiĝis, sed dank' al la klara preso de EPC, mi ne havas problemon legi la tekston. Kun granda intereso mi legis la raporton pri la Unua Azia Kongreso de Esperanto. Plaĉas al mi la gajaj vizaĝoj de la partoprenantoj. La komuna laboro certe akcelos la disvastigon de Esperanto.

**KLARA JUSTIS (Germanio)**

La financa situacio nialanda ne antaŭvidas plibonigon rilate al teknikaĵoj, do ni ne havos elsendon adresitan al vi en baldaŭa estonteco, tamen ni ĉiam proksimiĝas al vi tra legante vian gazeton kaj diskonigante vian agadon al la E-mondo!

**ESPERANTO-REDAKCIO  
RADIO HAVANO (Kubo)**

La prezentado de la juna grupo de geredaktoroj (1997.1) malfermas novan rubrikon "Junula-

ro". Tio certe plaĉos multe al la gejunuloj. Mi varme diskonigos. "Prospektivo al la nova internacia lingva ordo" akurate estas kompletigita por "Gazetara konferenco sen angla-lingva interpretado", bonege! Mi ĝuis belajn fotojn kaj tutan paĝon pri humuraj versaĵoj.

**LLUIS ARMADANS I MARFA**  
(Hispanio)


La plej grava parto de "Gazetara konferenco sen angla-lingva interpretado" estas la informo pri decido de la Ĉina Ministerio de Eksteraj Aferoj. Mi alte taksas la decidon, kiu estas racia kaj merita al Ĉinio kaj tre aktuala. Ĉi tiu procedo faras egalecon inter naciaj lingvoj kaj atentigas, ke la lingvoj de la malfortaj nacioj devas esti respektataj. Ĉi tiu historia decido certe estos favora por disvolviĝo de Esperanto kiel internacia helplingvo. Kiel mi legis, en la lasta pli ol duon-jarcento, esperantistoj staras ĉe ĉinaj progresemuloj, ĉe progresemaj sociaj movadoj, mi pensas, ke ankaŭ nun ne estas alie.

**SZENTGYÖRGYI ZOLTÁN**  
(Hungario)



# El Popola Ĉinio

6 [465] 1897



En novtipa jurto

Foto de Liu Sigong

La Interna Mongolio estas la unua aŭtonoma regiono de Ĉinio. Bruto-bredado estas ĝia tradicia ekonomia rimedo. Antaŭe la mongolaj paŝtistoj vivis nomadisme. La ĉina registaro asignis grandan sumon da mono en la pasintaj jaroj por helpi ilin plibonigi la vivon kaj disvolvi la produktadon. Nun ili jam kutimas loĝi fikse.

## EL POPOLA ĈINIO

Monata gazeto, eldonata de Ĉina Esperanto-Ligo  
**Redaktata** de Redakcio de "El Popola Ĉinio"

**Distribuata** de Distribua Fako de "El Popola Ĉinio"


**Direktoro:** Hou Zhiping

**Adreso:** P.O. Kesto 77, Beijing 100037, Ĉinio

**Telefono kaj telefakso:**  
**+86-10-6832 1808**

# ENHAYO

- 2 **INTER NI**
  - 4 **MULTNACIA ĈINIO:**  
50 jaroj de aŭtonomeco en Interna Mongolio
  - 7 E-instruado en la Pekina Lingva kaj Kultura Universitato
  - 8 Arta urbo Adelajdo
  - 9 **ĈINAJ E-ISTOJ:**  
Li volonte servas kiel pavimero
  - 12 **ORIGINALE VERKITAJ:**  
La ŝlosilo
  - 14 Kiel korekte prononci en Esperanto?
  - 16 **ESP-NOVAĴOJ**  
La Ŝanhaja Muzeo abunda je valoraj historiaj objektoj
  - 21 **HOMARO KAJ NATURO:**  
Naturparko de ruĝvertaj gruoj
  - 24 **POR KOMENCANTOJ:**  
Kiom forta estas la vivo?
  - 25 **NUNTEMPA BELARTO:**  
Ĉiu floro estas bela
  - 28 Informoj pri Hongkong (II)
  - 29 **LAŬ LA SILKA VOJO:**  
Fascinanta Dunhuang (II)
  - 36 Defie al altaj montpintoj de la mondo
  - 38 **EKONOMIE:**  
La unua jaro de la Naŭa Kvin-jara Plano de Ĉinio
  - 40 Bambuaj slipoj — libro antaŭ 2 000 jaroj
  - 41 **TEMO PROPONITA DE LEGANTOJ:**  
Filatelo en Ĉinio
  - 43 **ANTIKVAJ HUMURAĴOJ:**  
Aĉeti propran vinon; Fari ĉapon
  - 44 **EL ĈINAJ GAZETOJ**  
Lumo por blinduloj
  - 48 Suĉigu al la beboj patrinan lakton
  - 49 Riĉa rikolto en dezerto
  - 50 **KORESPONDI DEZIRAS**
  - 51 **ĈINAJ POŝTMARKOJ:**  
Taihu-lago  
2 Flugado
- SUR LA DORSKOVRILO:**  
**[FOTOJ FARITAJ DE E-ISTOJ]**  
La Placo de Herooj en Budapeŝto;  
Bieno en Skanio, suda Svedio



## Lokoj menciitaj en ĉi tiu numero

1. Interna Mongolio (p. 4)
2. Ŝanhajo (p. 17)
3. Tianjin (p. 46)
4. Hongkong (p. 28)
5. Bayanbulak-stepo (p. 44)



# 50 JAROJ DE AŬTONOMEKO

Teksto de BAO GUIHUA kaj HE XUELI  
Fotoj de BAO HAISHAN

**E**N norda Ĉinio situas la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio, unu el la 5 naciaj aŭtonomaj regionoj de Ĉinio, kies ĉefa parto de loĝantoj estas mongoloj. La unua de majo 1997 estis la 50-jara datreveno de ĝia naskiĝo.

## LULILO DE SURĈEVALA NACIO

La nomita regiono areas 1 180 000 kvadratajn kilometrojn. Topografie, ĝi similas al ĉevalo kun alte tenata kapo. En la historio potenciĝis tie hunoj, ŝjanbejoj kaj aliaj surĉevalaj nacioj. En Ĉinio Wang Zhaojun (Ŭang Ĝaŭĝjun) kaj Ĝingis-Hano estas vaste konataj. La unua estis belega knabino hana antaŭ 2 000 jaroj. Laŭ la suverena ordono ŝi edziniĝis al la huna ĉefo Huhanya por paco kaj amikeco inter la du nacioj. La lasta estis mongola heroo. Li unuigis la longe splititajn tribojn en norda Ĉinio.


Dum kelkaj jarcentoj antaŭ naskiĝo de la aŭtonoma regiono la Interna Mongolio estis en separatismo. Lokaj regantoj batalis senĉese inter si. La paŝtistoj kaj kamparanoj vivis kiel sklavoj. Sen tero aŭ kun tre malmulte da tero ili havis neniun demokratian rajton. Ĉio tio finiĝis post realiĝo de la nacia aŭtonomeco.

## GRANDA HARMONIA FAMILIO

En la Interna Mongolio vivas



Paŝtejo sur la stepo




Petrolkampo sur la stepo

23.84 milionoj da loĝantoj el mongola, hana, manĉura, huja kaj aliaj 45 nacioj. De la unua

tago post ekpraktikado de la nacia aŭtonomeco ĝuas la rajton de mastro ne nur mongoloj, sed an-



# EN INTERNA MONGOLIO



En la Baotou-a Ferŝtala Kompanio

Foto de YU HAIBAO

kaŭ alinacianoj, ĉu grandnombraj, ĉu malgrandnombraj. Ili ĉiuj havas egalan rajton en poli-

tiko, ekonomio kaj kulturo, sen distingo de etno kaj religia kredo. Ekz., ili rajtas uzi, reformi

kaj disvolvi sian lingvon, esti plene liberaj en religia kredo, konservi aŭ reformi siajn naciajn morojn kaj kutimojn. Dank' al tio, nelonge post sia naskiĝo, la aŭtonoma regiono fondis 3 naci-aŭtonomajn guberniojn kaj 15 naci-aŭtonomajn subdistriktojn laŭ la volo de oroĉunoj, evenkoj kaj daŭr-oj.

La plej alta aŭtoritata instanco de la Interna Mongolio estas la Popola Kongreso. La ĉefaj gvidantoj de ĝia konstanta komitato estas mongoloj. Ankaŭ la administrantaro de urbaj, guberniaj kaj subregionaj registaroj konsistas el diversnaciaj oficistoj, kies nombro konformas al la proporcio de la koncernaj nacioj, tamen estas certe, ke ĉiu nacio havas sian reprezentanton en diversnivelaj registaroj. La oroĉunoj estas la plej malgranda nacio en Ĉinio, tamen ili havas sian reprezentanton kaj en la popola kongreso de la aŭtonoma regiono kaj en tiu de la tuta lando.

En la nuna aŭtonoma regiono oni parolas la lingvojn mongolan, hanan, hujan kaj korean, inter kiuj la mongola kaj hana estas la plej vaste uzataj. La registaro proponas, ke la hanaj oficistoj lernu la mongolan lingvon. En la oficialaj kunvenoj kun ĉeesto de mongolaj kadroj, kiuj ne scias la hanan lingvon, oni invitas interpretiston. Krome, en ĉiuj lernejoj, ĉu en infanĝardenoj, ĉu en superaj lernejoj, oni instruas en la

lingvoj mongola kaj hana. En la pasintaj 50 jaroj la mongoloj el-kulturis ne nur siajn proprajn studentojn kaj esploristojn, sed ankaŭ sciencistojn, profesorojn, kuracistojn, inĝenierojn, verkistojn kaj artistojn.

La diversnaciaj popoloj vivas harmonie. Ili respektas kaj helpas unu aliajn. En Sanhe-vilaĝo loĝas mongoloj, koreoj kaj hanoj. Antaŭe 90% de la vilaĝanoj vivis malriĉe. Ili ofte almozis aliloke. Sed poste, ilia komuna klopodado ŝanĝis la fizionomion de la vilaĝo. Nun en la vilaĝo ĉie prosperas arboj, aromas floroj kaj videblas en verdaĵoj belaj loĝdomoj. Ebenaj vojoj etendiĝas en kaj ekster la vilaĝo... Nun oni malfacile distingas naciecon de la tieaj loĝantoj, ĉar multaj el ili parolas en kelkaj lingvoj.

## INTERNA MONGOLIO EN DISVOLVIĜO

La Flava Rivero, la dua granda rivero de Ĉinio, aparte favoras la Internan Mongolion per sia baseno kun areo de pli ol 170 000 kvadrataj kilometroj. Krome, tie fluas ankaŭ la riveroj Nenjiang, Ergune, Xiliao k.a. Ili

### Kuracado



dotis la regionon per fekunda tero, senlima stepo, densaj arbaroj, vasta agraro kaj riĉaj minajloj.

Tamen antaŭ la naskiĝo de la aŭtonoma regiono en 1947, la tiea produktiveco estis tre malalta, la paŝtistoj kaj kamparanoj plejparte vivis malriĉe. Pro tio, la aŭtonoma regiono devis unue disvolvi la produktajn fortojn kaj levi la vivnivelon de la popolo.

En la Interna Mongolio, unu el la gravaj brut-bazoj de Ĉinio, la stepoj kovras pli ol 870 000 hektarojn. De la lastaj jaroj sciencistoj entreprenas selektadon de herbospecoj kaj trovis la vojon por efike deteni la stepon de degenero kaj dezertiĝo. Rezulte de tio la stepoj de la Interna Mongolio pliboniĝis en la tuto, la nombro de ĝiaj diversaj brutoj atingis novan rekordon en la historio kaj stabile kreskis en la lastaj dek jaroj.

Antaŭe kadre de agrikulturo oni kulturis sole grenojn kaj poste ankaŭ la ekonomiajn plantojn. En 1996 laŭ la procentoj de la kresko de grena produktokvanto

la Interna Mongolio okupis la unuan lokon en Ĉinio kaj tiujare ĝia grena produktokvanto atingis 15.3 miliardojn da kilogramoj. Antaŭe la Interna Mongolio ne povis kontentigi sin per memproduktita greno, sed nun ĝi jam fariĝis grava grenproduktejo en Ĉinio.

Tie kuŝas karbobaseno Erdos, unu el la 8 plej grandaj de la mondo laŭ rezervokvanto, kaj troviĝas 4 el la 5 grandaj subĉielaj karbominejoj de Ĉinio. Energia industrio estas ĉefa industrio en la loko. Ĝia produktovaloro konsistigas seponon de la totala industria produktovaloro de la tuta regiono. Triono de ĝia elektro estas liverata al la Nordoriento, Pekino, Tianjin, Tangshan de Ĉinio kaj al najbara lando Mongolio. En la Interna Mongolio funkcias la Baotou-a Ferŝtala Kompanio, la kvina granda en Ĉinio.

## INTERNA MONGOLIO MALFERMITA

La limlinio inter la Interna Mongolio, Mongolio kaj Rusio longas entute 4 200 kilometrojn. Tie estas 18 doganoj gravaj por komunikiĝi kun Eŭrazio.

Kun profundigo de la reformado en Ĉinio kaj plua disvolviĝo de la ekonomia konstruado en la centra kaj okcidenta partoj de Ĉinio, la Interna Mongolio fariĝis multe atentata de alilandaj investantoj. De 1985, kiam estis starigita tie la unua alilanda entrepreno, ĝis 1996 aperis en la regiono pli ol 1 000 entreprenoj investitaj de 30 landoj kaj regionoj kun investa sumo de 900 milionoj da usonaj dolaroj.

La Interna Mongolio kun jarmiloj da civilizacio nun larĝe malfermas sian pordon al la tuta mondo. ■



LI WEILUN\*:

# E-instruado en la Pekina Lingva kaj Kultura Universitato

**D**ANK' al sia vicdirektoro Qiu Ji (Ĉiŭ Ĝji), fama ĉina esperantisto, la Pekina Lingva Instituto (nun Pekina Lingva kaj Kultura Universitato\*\*) funkciigis marte de 1979 E-kurson, kiun gvidis s-ro Zhang Haiping (Ĝang Hajping) el la Ĉina E-Ligo kaj en kiu lernis instruistoj

E-kurso funkcias ĝenerale en la dua semestro por la duaklasaj studentoj. Tiuj, kiuj lernis en E-kurso, trovis, ke multaj vorto-radikoj de Esperanto similas al tiuj de la lingvoj angla, franca kaj hispana, kaj ilia lernado de Esperanto multe helpas ilin lerni la duan fremdan lingvon en la tria klaso.

c) la gramatiko de Esperanto estas simpla, kaj oni bezonas nur malmulte da tempo por ĝin ekspliki, tiel ke oni povas havi pli multe da tempo por ekzerci la orelojn kaj langon; ĉ) la kursanoj estas junaj studentoj alte klerigitaj kaj parolantaj jam unu fremdan lingvon, kaj por ili taŭgas la metodoj rekta kaj kompara; d) la instrua periodo estas mallonga kaj lernohoroj malmultaj, mankas al la kursanoj ebleco multe sin ekzerci en aŭdado kaj parolado post la kurso, kaj oni devas bone kapti la lernohorojn por fari pli multajn ekzercojn aŭdajn kaj parolajn.

En mia kurso lernas ankaŭ studentoj el aliaj landoj kaj ĉinaj instruistoj, kiuj lernis Esperanton kiel la duan fremdan lingvon por ekzameno. Dum la pasintaj pli ol 10 jaroj 13 instruistoj trapasis la examenon kaj ricevis la titolon de docento, vicprofesoro aŭ profesoro. Multaj kursanoj daŭre partoprenas Esperantajn aktivadojn kaj gvidas E-kurson post diplomiĝo el la instituto.

Septembre de 1996 okazis inter esploristoj-studentoj de la angla lingvo prelego kaj diskuto pri Esperanto. Ili konsentis kun mi en tio, ke kono pri Esperanto helpas studi naciajn lingvojn. Post la diskuto ili interesiĝis pri Esperanto kaj montris deziron lerni la lingvon. ■

\*Vicprofesoro de la Fremdlingva Instituto de la Pekina Lingva kaj Kultura Universitato.

\*\*Ĝia ĉefa tasko: instrui la ĉinan lingvon al studentoj el aliaj landoj, krome instrui ankaŭ al ĉinaj studentoj la lingvojn anglan, francan, germanan, hispanan, araban, japanan, korean kaj italan.



La aŭtoro diskonigas Esperanton en parko.

kaj aliaj funkciuloj de la instituto. Influate de la kurso, ankaŭ studentoj de la fremdlingva fakultato deziris lerni Esperanton. Pro tio, la fremdlingva fakultato ekde 1980 prenis Esperanton kiel nedevigan lernobjekton. Kaj mi fariĝis instruisto de ĉiuj ĝiaj E-kursoj.

Dum la pasintaj 17 jaroj, escepte de kelkfoja ĉesigo, E-kurso funkciis ĉiujare kun 20-50 lernantoj kaj eĉ kun 100 en 1986. Ĝis nun entute 500 studentoj lernis en E-kursoj.

Por varbi studentojn al E-kurso, mi faris prelegon pri Esperanto, pri ĝiaj trajtoj kaj pri ĝiaj historio kaj movado, precipe pri ĝia utileco.

Studentoj lernas Esperanton duonjare, 2 horojn semajne. Fine de la kurso, ili devas trapasi ekzamenon kaj iliaj poentoj estas enskribitaj en la registrokajeron. Mi uzas la lernolibron "Elementa E-kurso (I)" kompilitan de mi mem. Mi aplikas sintezajn metodojn, t.e. metodojn gramatika-tradukan, aŭdoparolan, komparan kaj praktikan, ĉar a) ĉiaj metodoj havas kaj avantaĝojn kaj mankojn, kaj el ili oni devas asimili avantaĝojn; b) Esperanto estas ege diferenca de la ĉina lingvo. Sen traduki ĉinoj ne povas kompreni Esperantajn vortojn. Ankaŭ la gramatiko de Esperanto devas esti klarigita, ĉar multaj ĝiaj reguloj malsimilas al tiuj de la ĉina lingvo;

# Arta urbo Adelajdo



**E**SPERANTISTOJ, kiuj partoprenos la 82-an Universalan Kongreson de Esperanto en la 19-26-a de julio, renkontiĝos en Aŭstralio. Ilin bonvenigas la bela arta urbo Adelajdo, ĉefurbo de Sud-Aŭstralio, la 4-a granda urbo de la lando.

En Aŭstralio, la plej novekspluatita kontinento, troviĝas kanguruoj, brunaj ursoj kaj unikaj birdoj. Krom indiĝenoj, tie loĝas ankaŭ enmigrintoj el pli ol 140 landoj. Tial Aŭstralio estas multnacia lando. En ĝia historio Adelajdo estas la plej frua aŭtonoma urbo. En 1836 William la Kvara, reĝo de Britio, kronis la urbon per la nomo de la reĝino. Adelajdo situas piede de Monto Loftu, trafluante de Rivero Torrense, je 7 kilometroj for de la bela plaĝo. Ĝi havas milionon da loĝantoj.

Ĝia komerca kvartalo troviĝas en la urbocentro; ĝian industrian kvartalon tratranĉas trafika ĉeflinio; ĉiuj ĝiaj provizejoj estas konstruitaj proksime de doko kaj fervoja stacio; ĝiaj bankoj kaj asekuraj kompanioj staras kune; ankaŭ koncentriĝas ĝiaj hoteloj, kafejoj kaj restoracioj, registaraj oficejoj, servaj stabloj kaj diversaj lernejoj; ĝiaj loĝejoj lokiĝas dise en la antaŭurbo; ĉiuj ĝiaj domoj kun ĝardeno estas poeziaj. Inter ĝiaj kvartaloj komerca, industria

kaj loĝa estas grandaj parkoj. Ĝiaj arta centro, sportejo kaj Festa Teatro situas ĉe Rivero Torrense. La regula dispozicio donas al la loĝantoj grandan oportunon. Oni dankas kolonelon William Light, la unuan gubernatoron de la urbo, ke li skizis la planon de evoluo de la urbo. Kaj la sekvantaj urbestroj konstruis la urbon laŭ lia projekto, tiel iom post iom Adelajdo fariĝis moderna urbo.

La loĝantoj de Adelajdo amas arton. Ambaŭflanke de la rivero estas artoriĉaj instalaĵoj, multaj dekoracioj, eĉ luksajetoj de ordinaraĵoj elspiras ebriigan arton, tial Adelajdo ricevis la nomon "arta urbo". En bela Festa Teatro okazas ĉiun duan jaron la mondkonata Festivalo de la Artoj. Dum la festivalo estas ekspozicio, prelego, parado, teatro, dancado, kantado, deklamado ktp. La festivalo daŭras du semajnojn. La kongresejo de la 82-a Universal Kongreso de Esperanto estos proksime de Festa Teatro.

La Esperanto-movado de Adelajdo komenciĝis en 1889. La Unua Aŭstralia Kongreso de Esperanto okazis tie en 1911. Taŭgas ke la UK okazos en la longhistoria urbo de la multnacia kaj multkultura lando, kun la temo "Toleremo kaj Justeco en Multkultura Mondo", iniciatita de d-ro Zamenhof. ■



# Li volonte servas kiel pavimero

de WANG HANPING



Shen Xiaoxi

**D**UM la simpozio “Lusin\* kaj Esperanto” okazinta en Ŝanhajo antaŭ 6 jaroj mi konatiĝis kun Shen Xiaoxi (Ŝen Ŝjaŭŝji), kiu profunde impresis min kiel vigla juna samideano. Poste, dum pluraj jaroj ni ne havis ŝancon revidi unu la alian. Tamen de tempo al tempo li sendis al mi informojn pri aktivadoj de junaj ŝanhajaj esperantistoj.

Somere de 1996 ni refoje renkontiĝis dum la Unua Azia Kongreso de Esperanto en Ŝanhajo. Kvankam ne tiom juna, li restis ankoraŭ entuziasma kaj energio-plena. Dum la kongresaj tagoj ni ambaŭ estis okupitaj kaj nur post la kongreso ni havis tempon interparoli kaj mi sciis, ke li jam estas pli-ol-40-jara, kaj konis pli multe pri lia vivo.

En la aĝo de 3 jaroj li forlasis siajn gepatrojn kaj venis en Ŝanhajon por vivi kune kun siaj geavoj. Malfeliĉe, lin kripligis lia falo, kiam li vizitis elementan lernejon. Tamen la tragedio hardis lin. En la lernejo li ne nur diligente lernis, sed ankaŭ volonte faris ion utilan al aliaj. La de li redaktita

murgazeto estis vaste ŝatata en la lernejo.

Diplomiĝinte el mezlernejo, li eklaboris kiel kasisto en magazeno. Rapide li trovis ŝaton ĉe siaj kolegoj pro siaj vikleco kaj diligenteco. Samtempe li estis ankaŭ postlerneja instruisto de najbara elementa lernejo. En postlaboraj horoj li instruis geknabojn kaj amuziĝis kune kun ili.

Li esperantistiĝis en 1979. Lernante la lingvon, li propagandis ĝin en la elementa lernejo, kie li laboris kiel postlerneja instruisto. Poste li mem gvidis E-kurson, okazigis E-ekspozicion kaj donis konsultiĝon pri nia lingvo en vespero kaj ferioj.

Fininte E-lernadon en la vespera universitato de la Ŝanhaja Fremdlingva Instituto, Shen Xiaoxi kaj liaj pli ol 10 kunlernantoj starigis la Ŝanhajan Junularan E-Grupon. Poste, ili ofte faris interŝanĝon en lernado, ekskursis kaj piknikis kun verdstela flago, aŭ renkontiĝis kun alia E-grupo.

Dank’ al ilia klopodo, la Ŝanhaja E-Asocio starigis en 1989 sian

junularan fakon, kiu okazigis, kelkajn jarojn post sia fondiĝo, 10 konsultiĝajn aktivadojn kaj plurajn E-kursojn. Dank’ al tio, nemalmultaj ŝanhajaj gejunuloj ekkonis Esperanton.

Kvankam ne multe salajrata, Shen Xiaoxi amas sian profesion laboron kaj estas kontenta pri sia labormedio, ĉar liaj direktoro kaj kolegoj bone komprenas lin kaj subtenas liajn E-aktivadojn.

Shen Xiaoxi ŝatas piedpilkon, filatelon kaj des pli Esperanton. Li dediĉis multe da tempo kaj energio al Esperanto, tial li ne havis tempon viziti siajn gepatrojn kaj fratojn en malproksima loko. Ĉe la fino de 1995 li venigis sian pli-ol-70-jaran patron al Ŝanhajo, tamen li ankoraŭ ne havis tempon por akompani la maljunulon, kiu neniam plendis kontraŭ li, ĉar li bone komprenis sian filon.

Estas lia edzino, kiu pli bone komprenas lin. Dum la 10 jaroj post ilia geedziĝo, ŝi faris preskaŭ la tutan mastrumadon. Kvankam ŝi ne estas esperantistino, tamen ŝi tutforte subtenas sian edzon en E-aktivado. Ilia hejmo servas an-



kaŭ al esperantistoj. Foje, kiam la filo vizitis lernejon, la edzino malsaniĝis pro laco. Tiam li devis preni sur sin la mastrumadon. Malgraŭ tio li ne forlasis sian profesion laboron nek preparan laboron de la Unua Azia Kongreso de Esperanto.

Kiel membro de la Loka Kongresa Komitato, li bone plenumis sian taskon tute en postlaboraj horoj kaj multe laboris super memorkovertoj por la kongreso. Por disvastigi Esperanton, li sendis dum la kongreso pli ol 200 memorkovertojn al la lernejoj, en kiuj li gvidis E-kurson.

Shen Xiaoxi vivas vivon nerican, sed signifoplenan. Li diris, ke Esperanto jam fariĝis grava parto de lia vivo. Por pli bone disvastigi Esperanton, li volonte servas kiel pavimero. ■

\*Lusin (1881-1936) estis fama ĉina literaturisto.

1. Shen Xiaoxi (la tria de maldekstre) kunsidas kun aliaj samideanoj en sia hejmo.
2. Shen Xiaoxi (la tria de maldekstre en la fronto) kaj aliaj samideanoj dum turisma vojaĝo
3. Shen Xiaoxi rakontas al sia filo pri filatelo.
4. Shen Xiaoxi (la dua de maldekstre) kun japanaj esperantistoj







# La ŝlosilo

de SALVADOR GUMÀ i CLAVELL (Hispanio)



La aŭtoro

**R**AJMONDO, la tria filo de l' vilaĝanino Tereza, naskiĝis en 1865 en vilaĝo distanca je cent kilometroj de Barcelono, la kataluna ĉefurbo. Kiam li estis kvinjara, mortis lia patro kaj en juna aĝo mortis ankaŭ liaj du fratoj pli aĝaj ol li.

Laŭ nuna konsidero tiu familio estis preskaŭ mizera, ĉar ĝi vivis el seka, neirigaciebla grundo situanta je kvar kilometroj de la vilaĝo, kio trudis ĉiutage du horojn da piedirado sur vojo destinita precipe por azenoj. Tial Rajmondo en sia laboraĝo serĉis laboron, kaj majstro Kiku, ferajisto kaj forĝisto dungis lin kiel helpanton kaj metilernanton. En la unua tempo li devis tiradi la ĉeneton de la granda super la kapoj pendanta balgo, kies blovo ekscitis la ŝtonkarban fajron kaj kies duklapa valvo je ĉiu ĉentiro klaketis alterne kvazaŭ ĝi dirus: Tridek tri, tri... Tridek tri, tri... Tridek tri, tri.

Post kelkaj semajnoj, kiel forĝisto li devis levi alten la martele-

gon kaj frapi sur la per fajro ruĝigitan ferpecon, kiun mastro Kiku por forĝado tenis per tenajlo, kaj apogis ĝin sur adekvata loko de la dukorna amboso. Al Rajmondo tiu laborspeco montriĝis tre kruda kaj precipe senperspektiva; tial li kuraĝe decidis diri "Adiaŭ!" al majstro Kiku kaj elmigris en Barcelonon serĉi pli bonan. Tie li dungigis ĉe seruristo, kies klientaro estis de alta rango, pro kio li povis laŭgrade prosperi en la metio ĝis li fariĝis siatempe laborestro kaj povis servi fidele sian patronon dum pli ol dudek jaroj.

Laŭ ŝtata leĝo, en sia dudekjara aĝo li devis fariĝi soldato, kaj kontraŭ lia metia prosperado la sorto destinis lin partopreni kiel soldato en tiu senfina militado en Kubo, kie nombrego da junaj hispanoj falis kiel militviktimoj, infektite de la amerika febro aŭ embuskinte kiel tiu patrolano, kiu haltinte dum marŝado por natura bezono, estis trovita post longa momento, sternita en sanga flako, kun sia seksorgano, amputita, en

la buŝo! Tial, konfuzite de la nigraj pensoj en tago kaj eĉ de feroĉaj inkuboj en nokto, li iris kun angoro al sia mastro por helpo aŭ saviĝo el tiu certega danĝero. Li diris, ke se li havus rimedojn li elaçetus sin el la soldatservado kaj el transmara milito, same kiel aĉetis sin el la sklaveco iuj sklavoj el la estinta Roma Imperio.

La mastro sentis en koro kaj animo lian justan angoron pro la neniam bonaj militsekvoj, kaj sen alia garantio ol lia neriproĉebla konduto proponis al li la necesan monon por ke li sin elaçetu. Rajmondo humile akceptis kaj promesis nepre repagi al li, el sia lukro, per partaj pagoj ĝis inkluzive la lastan moneron el lia dankinda prunto, vera elmonstro de sincera, persona estimo. Nobleco noblecon kreas.

Pro sia negrasa salajro kaj la grasa ŝuldo al sia respektinda patrono li tuj spronis sin kaj baldaŭ dungigis en la fama operteatro Liceo de Barcelono kiel helpanto en

la skipo da kulisistoj, kiuj vigle en momento ŝovas, tiras, puŝas, ŝanĝas, levas kaj mallevas kulisojn laŭ la respektivaj dekoracioj respondaj al operaktoj.

Al Rajmondo tiu metio jam fariĝis familiara, kaj multaj monatoj pasadis al li sen gloro kaj ĉagreno; sed neatendite, iam en la lastaj mil okcentaj jaroj leviĝis en Barcelono grava teroro — laŭdire — de anarĥiistoj, kaj ankaŭ neatendite en Liceo, el supra pulgalerio oni ĵetis bombon, pro kies eksplodo mortis spektantino sidanta sur partera fotelo. Sekvis tuj dua bombo, kiu ne eksplodis, ĉar ĝi trafis la sinon de — ho, la hazardo! — de la ĵus mortigita, kaj se ĝi estus ebla, nun remortigita virino!!

Oni nun imagu post la eksplodo, la tujan, senbridan tumultegon en la tuta, granda teatro kaj la angoron en tiuj hejmoj, kies familianoj sin trovis tie. Rajmondo vigle ŝovis sin en la teruran tumulton kaj baraktis kiom li povis por trovi junan vidvinon nomatan Jozefa, de li konatan, ĉar ŝi ofte vizitis Liceon serĉante distron en honestaj kaj gravaj operprezentadoj, kontraŭ siaj mil doloraj pensoj. Vane li serĉis ŝin en tiu tago, ĉar bonŝance ial ŝi ne povis viziti la operejon kaj sekve ŝi trovis sin for de la bombeksplodo.

Jozefa estis juna, nur dudektrijara, “edzinigita” antaŭ ses jaroj! Certe, ne longe daŭris ŝia mielmonato, ĉar ĝi baldaŭ turniĝis en kalvarion: Ŝia edzo grave malsaniĝis, kaj dum li estis en kliniko preparate por operacio, mortis ilia ĉarma bebo. Kiam ŝi sciigis lin pri la terura perdo, li respondis konsternite: “Mia kara, kuraĝon, ni havos alian!!”

Sed li eraris, ĉar la malfeliĉoj neniam iras unuope. Tri semajnojn post sia operacio, ankaŭ li mortis!! Al bonkora Rajmondo ŝia malfeliĉeco vekis helpemon kaj senton de humana amikeco.

Jam de longe Rajmondo revis

kaj revis spekti normale almenaŭ tutan operakton, ĉar el trans la interkulisaj, nelarĝaj fendoj li vidis ne la aktorojn kaj la mirindajn sopranulinojn sed la vastan sternaĵon da spektantoj, kiujn Rajmondo ŝerce nomis “Vivantaj Mumioj”, ĉar ili tie, devas ne paroli, nek tusi, nek terni, nek mungi al si, nek voĉe oscedi tro vaste, ĉar en Liceo nepras absolute tomba aŭ katakombasilento. Laŭ formo, mumioj transvivis la morton. La vivantaj “mumioj” povis ne transvivi la vivon, ĉar jam antaŭe teroristoj profanis la etosan sanktecon de la granda Liceo.

En flanko de la scenejo estis antikva, iel mistera pordo ĉiam fermita kaj ŝlosita. Rajmondo sciis ke post ĝi troviĝas ŝtuparo kondukanta supren, sur la teatran plafonon, kies lukoj ofte logis lin, ĉar per ili li povus spekti privilegie la operdramojn; sekve, kiel seruristo li elfaris per metiaj artifikoj ŝlosilon nepre grandan kaj pezan similan al tiuj, kiujn laŭ antikva pentraĵo, tenis en mano Sankta Petro, la ĉielpordisto.

Diskrete Rajmondo kvazaŭ ŝtelisto ŝovis en la serurtruon la falsitan iom lubrikitan ŝlosilon, kaj klik-klak, li eniris, kaj tuj klak-klak, li reŝlosis glate, sen grinado. Pro zorgemo li metis la ŝlosilon en la internan jakpoŝon kaj iris supren. Li demetis la ŝuojn, kaj sur piedpintoj alproksimiĝis al centra luko, tie li surgenuiĝis kaj kliniĝis en la lukon kvazaŭ subtegmenta rato. Subite, aj! La peza ŝlosilo, neniel impulsite, nun mem elglitis pro sia pezo kaj lia kliniteco, desaltis de la poŝaperturo, faris kapriolon, kaj jam en la luko... sorĉe! Ĝi haltis kroĉiĝinte per siaj “dentoj” sur la akra rando de tiu luko, kie ĝi dum momento balanciĝis kiel cirka ŝnurdancisto. De nun li vidis kaj aŭdis nenion el la opera dramo. Li sentis sian propran dramon. Li vidis nur la teruran ŝlosilon, kiun li ŝajne senmovi-

gis per la radioj de sia fiksa rigardo. Li eĉ ne riskis moveti sin, timante ke simple spiraĵo povus depuŝi la ŝlosilon en la grandan vakuon. Dume, ĝi minacante pendadis tie simile al Demokla glavo ligita per nenio al nenio. Kio, se ĝi deglitis? Liaj pensoj plu kirliĝis en rondo de danĝeroj, kiujn pro timego aŭ paniko li imagis nepre okazontaj. Li vidis ke neniu sidloko vakas en la vasta parteroj, kaj estis evidente, ke ankoraŭ ne stompigis la memoro pri la kriminta bombo.

Granda kaj peza ŝlosilo ne forĝiĝas spontanee sub la alta plafono de teatro por ekflugi kiel kosma raketo rekte suben al ies beata kapo. Certe, la vivinstinkto sufloris al li eskapi, sed li mem ja enŝlosis sin per propramane farita ŝlosilo nun forfluginta! Frosta ŝvito lin tremigis. Li jam vidis sin antaŭ tribunalo, kiu akuzas lin pri krimo... kaj subite, en la paroksismo de sia aflikteco, simile al stelo en nigra ĉielo aperis rimedo en lia surplanke kuŝanta kaskedo! Pensite, farite! Kun la kaskedo en mano li etendis la brakon ĝis sub la ŝlosilo, kaj ne spirante levis la manon ĝis tio, ke la ŝlosilo dekroĉiĝis kaj kiel ĵus demetita ovo de hirundo falis en la improvizitan neston.

Nun, spektinte nur sian dramon, li starigis sin kaj ektritis malsupren kun la ŝlosilo en mano. Klik-klak, li tiris la pordon, eliris, kaj klak-klak, li reŝlosis kaj evitis tujan renkontiĝon kun kolegoj. Jam nokte, irante hejmen li pasis antaŭ sendoma grundo, svingis la brakon kaj per sia tuta forto forpafis la ŝlosilon en la senlumcon.

Nun, li pensis ke al neniu li devas riveli sian tragedion, ĉar kiel diris Zamenhof, “Se la sorto vin batas, mokantoj ne mankas”. Eble oni eĉ plezuris ke lia koro preskaŭ haltis de angoro; sed, ĉar de koro tro plena buŝo parolas, por serenigi sin li iris al malfeliĉa Joz-



efa pensante ke ofte la malfeliĉeco kunigas la homojn; ke ŝi do amike aŭskultos lin kaj nur domaĝos lian travivitan angoron same kiel antaŭe lia parolo evidente sonoris al ŝi en la koron, konsolon kaj esperon. Ĝuste tiel okazis. Ili longe babilis kaj estas rimarkinde, ke tiu ŝlosilo diableca laŭ funkcio kaj iel sankteca laŭ formo, per kiu malfermiĝis tiu forgesita pordo kaj preskaŭ okazis katastrofo, nun pro ĝi malfermiĝis al ili reciproke la koroj.

La vivo plu fluadis glate kva-zaŭ rubando teksita el ĉagrenoj, iluzioj, penoj, sopiroj, deziroj kaj ia senreviĝo. Ili plu renkontiĝis kaj pliiintimiĝis ĝis ilia amikeco turnis sin en amon. En la tiam kuranta jaro 1896, ĝuste antaŭ cent jaroj ili geedziĝis en Barcelono.

Ne nur por celebri tiun centan datrevenon mi verkis en Esperanto tiun ĉi rakonton, sed por proklami ankaŭ ke mi ŝuldas mian vivon kaj mian esperantistecon al nerektaj sekvoj de tiu kriminta bombo en Liceo kaj al tiu en Liceo preskaŭ kriminta ŝlosilo. Ambaŭ faktoj pelis Rajmondon al Jozefa, al ilia intimiĝo kaj geedziĝo, de kiu mi naskiĝis en 1901.

En 1909 — tiam mi estis okjara — okazis en Barcelono la Kvina Universala Kongreso de Esperanto. En nia landeto ĝi levis vastan entuziasmon, kiu atingis eĉ miajn gepatrojn loĝantajn je cent kilometroj fore. Ilia favora opinio al Esperanto faris min latentan esperantisto, kaj en mia deksejara aĝo, tuj vidinte kursanoncon, mi eklernis Esperanton.


Jozefa, mia patrino, mortis en aĝo de kvindek kvar jaroj, pro kancero, enteriginte la unuan edzon kaj tri filojn, kaj naskinte ses fojojn.

Rajmondo, mia patro, mortis en aĝo de 88 jaroj post trijara bliŭdeco kaj ĵusa rompiĝo de femuralo.

Salvador, mi, la subskribinto, sur la sojlo de siaj naŭdek kvin jaroj ankoraŭ ne mortis, ĉar li deziras rakonti al vi tiun ĉi, ĝis nun, sian lastan rakonton el la vivo. ■

ANDRZEJ PETTYN<sup>1</sup> (Pollando):

## KIEL KOREKTE PRONONCI EN ESPERANTO?



La aŭtoro (meze) kaj EPĈ-vicĉefredaktoroj Tan Xiuzhu (maldekstre) kaj Dai Song'en

### I

Ludoviko Zamenhof en siaj famaj dek ses reguloj (paragrafo 9) en la *Fundamento de Esperanto* skribis: *ĉiu vorto estas legata, kiel ĝi estas skribita*. Kiam li aperigis ĉi tiun regulon en 1887, li tamen ne antaŭvidis, ke homoj, kiuj uzas malsamajn etnajn lingvojn, povas interpreti la regulon tute malsame. La demando de korekta prononco fariĝis tre grava, kiam la lingvo forlasis la epokon de skriba uzado kaj eniris la periodon de parolaj kontaktoj. Ĉi tiu demando estis unu el la ĉefaj diskuttemoj de la generala kunsido dum la 1-a UK en 1905. El la raporto pri ĉi tiu

kunsido aperigita en la gazeto *Lingvo Internacia* ni ekscias, ke *estis tuŝitaj la demandoj pri neĝusta metado de la akcento sur la lastan silabon fare de francoj, pri la necesa elparolado de "aŭ" kaj "eŭ" kiel unu silabo; laŭ invito de Zamenhof sinjorino Rosa Junk deklamis "La Vojo"; post la deklamado li rimarkigis, ke "l" devas esti elparolata "plej klare, nek tro mole, nek tro malmole, sed en meza maniero"*. Sekvis demandoj kaj diskutoj pri la elparolo de vokaloj **e**, **o**, **a**, pri ties longeco aŭ mallongeco. Zamenhof klarigis, ke *en Esperanto ĉiuj literoj devas esti mezaj, sekve ankaŭ e devas estis nek*

tro fermita, nek tro malfermita. Carlo Bourlet esprimis opinionon, ke en kunmetitaj vortoj *estas pli facile uzi tiom da akcentoj, kiom estas da kunmetradikoj* por atingi pli klaran komprenon; ĉi tiun opinionon Zamenhof aprobis. Interesa estas la opinio de Bourlet pri malgrandaj diferencetoj en la prononcado, kiuj *tute ne malhelpas la komprenon* kaj li trovas, ke *estus bedaŭrinde, se malaperus tiu rimedo rekoni la naciecon de la esperantistoj*. Oni parolis ankaŭ pri la fonemoj: **d**, **n**, **ĵ**, **r** kaj aliaj.

De post la 1-a UK la parola uzado de E-o pli kaj pli vastiĝis. Dum personaj kontaktoj de diversnaciaj E-o konfrontiĝis kun diversaj prononc-tendencoj, influataj de tiu aŭ tiu nacia lingvo kaj nacilingva parolmaniero. La Zamenhofa kabineta surpapera planlingvo kun la vastiĝo de la parola uzo iom post iom transformiĝis en plenvivantajn lingvon. Samtempe la e-ista komunumo dum siaj kunvenoj pli kaj pli observis la parolmanieron de bonaj parolantoj de la lingvo. Rezulte de tio iom post iom elformiĝis sufiĉe unueca, vere internacia prononcmodelo, kiu — kvankam ĝi baziĝas sur la Zamenhofa regulo el 1887 — estas tamen preskaŭ tute libera de la fonetikaj katenoj de la gepatraj lingvoj de la parolantoj. Kaj do — oni povas diri, ke kreiĝis iaspeca prononcnormo, kiun ankoraŭ ne sankciis la Akademio de Esperanto, sed ĝi jam funkcias en la praktiko. Mi kredas, ke Pola Radio per siaj ĉiutagaj Esperanto-elsendoj aŭdigataj jam 35 jarojn<sup>2</sup> konsiderinde kontribuas al la ellaboriĝo de ĉi tiu internacia prononcnormo, i.a. per la ofta aŭdigado de intervjuoj kun personoj, kies parolmanieron oni nomas modela<sup>3</sup>.

## II

Unu el la bazaj kriterioj de bona prononco en Esperanto estas ĝia facila komprenebleco por parolantoj de diversaj etnaj lingvoj. Se la prononcmaniero ebligas facilan interkompreniĝadon sen miskomprenoj, se ĝi ne naskas konfuzon, tiam oni povas konstati, ke ĉi tio

estas tre esenca kaj grava. Dum universalaj kongresoj aŭ aliaj e-istaj konferencoj internaciaj ni ofte renkontas homojn, kiuj estas influataj de nacilingva prononcmaniero, sed se ni povas interkompreniĝi kun ili relative facile kaj se ne sekvas miskomprenoj, tiam la prononcmaniero estas tute akceptebla. Kaj do tre grava kriterio de bona prononco estas observado de la fonologia karaktero de E-o. Ja estas diferenco<sup>4</sup> inter “rusa samideano” kaj “ruza samideano”, inter “kruco” kaj “kruĉo”, “bisi” kaj “pisi”, “legi” kaj “leki”, ktp.

Plej ofte la malobservado de la fonologia karaktero de Esperanto fontas el la fakto, ke la parolanto ne povas liberigi sin el la influo de sia gepatra lingvo, de loka (dialekta) prononcmaniero ktp. Kelkfoje ne povante subigi sin al la reguloj de la fonologio de E-o, oni eĉ provas tie kaj tie lanĉi la opinionon, ke tio aŭ tio estas permesebla. Ekz. la voĉasimilo. Waringhien kaj Kalocsay en *Plena Analiza Gramatiko de Esperanto* asertas, ke “ĉe senpera sinsekvo” de konsonantoj voĉa kaj senvoĉa, neevitebla estas la sonkonformiĝo de unu el ili. Kaj tiam oni prononcas “absolute” kiel “ap-solute”, “okdek” kiel “ogdek”, “longtempe” kiel “lonktempe”, ktp. “Teorie — skribas Kalocsay/Waringhien — oni povas tion kondamni, sed la postuloj de la parolorganoj estas pli potencaj ol la teorio.” Aliflanke la konata aŭtoro de lernolibroj H. Seppik (estono) en sia “La tuta Esperanto” asertas, ke “en la vortoj ‘absolute, absurda, ekzemplo, ekzisti k.a.’ **bs** kaj **bt** devus esti elparolataj kun la sama **b** kiel en “sabato” kaj “abdiki”, **kz** kun la sama **k** kiel en “akra”. Sed tio estas malfacila kaj kontraŭnatura. Tial ni diras kiel en aliaj lingvoj “ap-solute, absurdo, optuza, egzemplo, egzisti”. Sed en kunmetitaj vortoj kaj post prefikso **ek** ili, kompreneble, konservas sian originan prononcon: **korbtenilo**, **trabsigno**, **ekzumi**.”

Komentante ĉi tion, Atanas Atanasov en sia libro “La lingva

esenco de Esperanto” konstatas, ke “klara parolanto konsideros la apartajn konsistajn partojn de la kunmetita vorto kaj evitos prononci **ng** kiel **nk** kaj **vs** kiel **fs**.” Prof. John Wells en la libro “Lingvistikaj aspektoj de Esperanto” (aĉeteb-la ĉe UEA) pri la sama fenomeno konstatis: “En Esperanto ĝi povas konduki al miskomprenoj nur en vere malmultaj kazoj (subtaso-suptaso), do eble estu tolerata — sed ne rekomendinda, precipe por angloj kaj por aliaj, kiuj devus aparte lerni fari ĝin.” Jes, la voĉasimilo ne estu rekomendinda. Ekz. en la pola lingvo ĝi ekzistas, sed parolante en E-o mi mem ĉiam klopodas eviti ĝin, por ke mia prononco estu maksimume perfekta. Do, mi ne diras “mond/t/milito”, sed tute klare “mondmilito”, do monda milito.

Fine mi ankoraŭ substreku, ke ekzistas ankaŭ estetika kriterio. Pri kelkaj homoj oni diras, ke en E-o ili ne nur prononcas korekte, ke ili parolas klare, sed ankaŭ bele, agrable por la oreloj de aŭskultantoj. Kvankam tio estas subjektiva afero, sed se la subjektivan opinionon prezentas multaj personoj, tiam ĝi fariĝas ĝenerala opinio. Ni klopodu paroli klare kaj bele, alivorte — estetike! ■

1. La aŭtoro de la artikolo estas radioredaktoro (en la E-Redakcio de Pola Radio) kaj membro de Akademio de Esperanto. Li verkis multe da E-lernolibroj kaj ekzercaroj, i.a. “La Esperanto-fonetiko en praktiko” (kune kun 2 kasedoj enhavantaj parolekzercojn), “Esperanto laŭ amuz-metodo”, “Laŭtemaj Esperanto-Konversacioj”, “Esperanto en dialogoj” k.a.

2. La 4-an de aprilo 1997 oni komencis la 39-an elsendo-jaron.

3. Mi menciui pri la intervjuoj de prof. d-ro J. Wells, d-ro V. Sadler, S. Stimec, I. Jerdman, W. Blanke, A. Tomecki (necesus aldoni pliajn 20-25 nomojn).

4. Ekzemplojn de diferencoj oni trovas en “Esperanto-fonetiko en praktiko” (kune kun multaj rekomendoj pri tio, kion oni evitu).

**ĈINIO**

● Fine de 1996 okazis la 3-a Kongreso de la Yancheng-a Esperanto-Asocio de Jiangsu-provinco. Oni elektis la 3-an Komitaton kun s-ro Yao Kaishen kiel ĝia prezidanto kaj s-ino Tang Shouqin kiel ĝia ĝenerala sekretario. La komitato decidis: restarigi sian bultenon "Yancheng-a Esperantisto"; difini duan dimanĉon de ĉiu monato kiel ago-tagon; daŭre propagandi E-on en superaj lernejoj; funkciigi E-kurson por infanoj. La adreso de la asocio: Yao Kaishen, N-ro 23 Huancheng Beilu, Yancheng, CN-224001, Ĉinio. (YEA)




**Partoprenantoj de la 2-a kunsido de la Tria Komitato de la E-Asocio de Yunnan**

● La 24-an de januaro 1997 okazis la 2-a kunsido de la Tria Komitato de la E-Asocio de Yunnan-provinco. Oni difinis la ĉefan taskon de la asocio por 1997.

Komence de februaro, belga s-ano Jorg De Mulder, vicprezidanto de la Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO), kaj germana s-anino Natalie Schuchert ĝuis la Printempan Feston — tradician ĉinan feston, kune kun e-istoj de Yunnan. (Liu Yanhua)

**AŬSTRALIO**



**Esperantista familio de Aŭstralio**

● Esperanta Familio — Kiam aŭstraliaj kemiistoj David kaj Barbara Bruer geedziĝis, ili decidis aĉeti vitejon kaj fariĝi vinfaristoj en Strathal-

byn, kampara regiono 80 km for de Adelaide. Kiam naskiĝis filo Michael kaj filino Heather, la gepatroj decidis, ke la infanoj fariĝu dulingvaj. Barbara studis la lingvon dum suĉis la dua bebo Heather, kaj pro tio, Heather parolis Esperanton antaŭ ol lerni la anglan, kaj ambaŭ infanoj komprenas ĉion en Esperanto. Jam vizitis ilin kaj loĝis ĉe ili esperantistoj el multaj eŭropaj kaj aziaj landoj. Barbara rapide fariĝis bona esperantisto kaj facile trapasis la superan ekzamenon.

(Max Wearing)

**DANIO**

● Esperanto-semajno pri la kosmologio de Martinus okazos inter 10a-16a de aŭgusto 1997 en Danio. En tiu semajno la tuta instruado pri la kosmologio de Martinus okazos en Esperanto, kiu estas la internacia lingvo de Martinus-Instituto. La kosmologio montras, ke ekzistas psikaj naturleĝoj pri pensado. Scio pri tio ebligas al la homo ekregi sian menson kaj future krei mondregnon surbaze de kosma logiko kaj humanismo. Petu senkostajn broŝurojn kaj provekzempleron de la revuo Kosmos ĉe Martinus-Instituto, Mariendalsvej 96, Dk-2000 Kopenhago F, Danio.

(Poul Dyrholm)


**HISPANIO**

● La 15-an de decembro 1996, en publika kunveno en Liceo de Malaga, Hispanio, la Nacia Sindikato de Hispanaj Verkistoj kaj Andaluzia Esperanto-Unuiĝo publikigis kune kun la juĝantaro la rezulton de Beletra Konkurso "Jose Rodriguez Huertas". Verko premiita: Traduko de "La Nigra Spartako" de Geraldo Mattos. Tradukinto: Jose Francisco Martin del Pozo. Oni liveris al la tradukinto la respondajn premion kaj diplomon. Donacis librojn al la konkurso por premii la plej bonan tradukon: El Popola Ĉinio, Heroldo de Esperanto, Libroservo de Hispana Esperanto-Federacio, Luis Serrano Perez kaj Vidvino de Luis Mimo Espinalt. Ilia kunlaboro ebligis grandparte la realigon de la konkurso. Nacia Sindikato de Hispanaj Verkistoj kaj Andaluzia Esperanto-Unuiĝo tre dankas ilin pro tio. Ili organizos la Tradukan Konkursan "Jose Rodriguez Huertas". La limtempo de akcepto de la verkoj finiĝos la 31-an de oktobro 1997. Tiurilate, la poŝta stampo atestu la daton. La 14-an de decembro 1997 oni publikigos la verdikton kaj la juĝantaron. Por ĝia regularo skribu al: Andaluzia Esperanto-Unuiĝo, Poŝtkesto 864, E-29080 Malaga, Hispanio.

(Andres Martin Gonzalez)



# La Ŝanhaja Muzeo abunda je valoraj historiaj objektoj



**Ĉ**E la Popola Placo en la centro de Ŝanhajo estas konstruaĵo kun kvadrata bazo kaj ronda supro elstara. Ĝi enkorpiĝas la iluzion de la antikvaj ĉinoj pri la universo: ronda ĉielo kaj kvadrata tero. En la okuloj de la ĉinaj arkeologoj, ĝi tre similas al tenil-hava bronza *ding-o* (tri- aŭ kvar-piedaj kvadrataj ujoj de la antikva Ĉinio).

Tio estas la nova Ŝanhaja Muzeo malfermita antaŭ nelonge. En la domo kun plankareo de 40 000 kvadrataj metroj estas 11 galerioj, tri eksponejoj kaj unu biblioteko.

## ALTVALORAJ HISTORIAJ OBJEKTOJ



La muzeo fondiĝis en 1952. En la komenco ĝi situis en domo de banko. Tiu ŝtata muzeo entenas pli ol 600 000 historiajn objektojn de 21 kategorioj, el kiuj 120 000 estas raraj. En ĝi estas ne nur multe da bronzaĵoj, sed ankaŭ kaligrafiaĵoj, pentraĵoj kaj porcelanaĵoj faritaj en la dinastioj Ming kaj Qing (1368-1911). Oni diris, ke ĉ. duono de la ĉinaj historiaj objektoj konserviĝas en tiu muzeo. La muzeo allogas multe da turistoj ĉinaj kaj alilandaj, kiuj

spertas tie la kvinmil-jaran ĉinan civilizacion.

En la muzeo, antaŭ ĉio, oni povas vidi antikvajn bronzaĵojn de Ĉinio. Tie eksponiĝas bovforma vinujo kaj gamosonorilaro de markizo Su de Jin-regno en la ĉina historio, sur kiu legiĝas epigrafo, kiun ne konas aliaj historiaj verkoj. Ĝi estas grava kompleto de la historiaj materialoj pri la Okcidenta Zhou-dinastio (la 11-a jc. — 771 a.K.). La Ŝanhaja Muzeo abundas je bronzaĵoj, el kiuj multaj estas tradiciaj trezoroj en Ĉinio.

Estas longa la historio de ceramika industrio en Ĉinio. En la muzeo konserviĝas pli ol 20 000 altvaloraj ceramikaĵoj kaj eksponiĝas nur malgranda parto de ili. La trikoloraj ceramikaĵoj faritaj en Tang-dinastio (618-907) estas plej allogaj. Tie eksponiĝas ankaŭ porcelanaĵoj elbakitaj en kvin grandaj bakujoj de Song-dinastio (960-1279).

En la muzeo konserviĝas multaj kaligrafiaĵoj kaj pentraĵoj plejparte faritaj en Ming- kaj Qing-dinastioj. En la galerio de kaligrafiaĵoj vidiĝas pli ol 100 verkoj de diversaj dinastioj de Ĉinio, kiuj manifestas la evoluon de la ĉinaj ideogramoj. Plej men-







1. Bovforma vinujo
2. Jada homo
3. Bronza monero
4. "Belulino"
5. Brodita mjaŭ-a kostumo
6. "Insekto"

1	4	5
2	3	6



ciindaj estas la kaligrafajoj de Wang Xizhi (Ŭang Ŝjiĝi), eminenta kaligrafo de la Orienta Jin-dinastio (317-420). En la galerio de pentraĵoj eksponiĝas verkoj de majstroj de diversaj dinastioj de Ĉinio.

La galerio de antikvaj ĉinaj jadaĵoj paradas antaŭ la publiko per sia originaleco. Tie vidiĝas jadaj ritiloj kaj ornamaĵoj faritaj de la komenco de la homa civilizacio ĝis Qing-dinastio (1644-1911). La jada homo de Longshan-kulturo estis kreita en la lasta periodo de neolitiko, el helverda jado. Ĝi, en stranga formo, estas prenita kiel emblemo de la muzeo.

La galerio de sigeliloj de diversaj dinastioj de Ĉinio altiris al si multajn vizitantojn. Tie ĉiu sigelilo havas sian propran historion. La fama jada sigelilo de huna ĉefministro estas valora atesto pri la frua kontakto de la nordaj hunoj kaj hanoj. En la galerio de antikvaj moneroj kaj monbiletoj oni povas vidi multajn monbiletojn, la plej fruajn en Ĉinio.

Tie estas ankaŭ galerioj de antikvaj mebloj, nacimalplimultaj metiarĵoj kaj skulptaĵoj.

## MUZEO MODERNIGITA

La nova domo de la muzeo estas ekipita per modernaj aparatoj kiel komputiloj estas la plej grava parto de la servo-sistemo.

En la vestiblo oni povas vidi multmedian komputilon vestitan per tavolo da bluverda marmoro. Ĉe la tuŝeto de la montro-ekrano ĝi konigas la historion, eksponaĵojn kaj ekipaĵojn de la muzeo en la lingvo bezonata de la tuŝanto.


En la dekelkaj galerioj, provizitaj per modernaj ekipaĵoj, la historiaj objektoj prilumataj kvazaŭ paradas pri sia antaŭa brileco. Kun funkciado de optikaj fibroj la jadaĵoj aspektas pli belaj, dum indukta priradiado utilas al la protekto de la antikvaj pentraĵoj kaj lingva indik-sistemo konigas la vizitantojn el malsamaj landoj pri la eksponaĵoj.

En la muzeo funkcias aŭtomat-rega sistemo. Per komputiloj ĝi superregas centojn da ekipaĵoj kaj temperaturon, humidecon kaj prilumadon de pli ol 1 000 lokoj tra la tuta muzeo kaj akurate donas instrukcion por reguligo de humideco kaj temperaturo, por ke la objektoj ĉiam estu en plej bonaj kondiĉoj sin konservi. En ĉiuj tenejoj kaj galerioj funkcias diversaj monitoroj, kameraoj, alarmiloj kaj ŝtelimunaj pordoj, kiuj ĉiuj formis fidindan defend-sistemon.

La muzeo funkciigas TV-studion. Pere de larĝ-ekrana televidilo ĝi popularigas al la vizitantoj la

sciojn pri historiaj objektoj, konigas al ili arkeologian kaj muzeologian studon.

Oni povas viziti ankaŭ la bibliotekon de la muzeo. Tie estas ne nur pli ol 200 000 libroj pri historio kaj artoj, sed ankaŭ dokumentoj pri ĉ. 100 000 historiaj objektoj kaj banko de informoj pri la tie konservataj objektoj. La vizitantoj povas rigardi la



**Infanoj interesitaj de antikvaĵoj**

deziratajn objektojn sur ekrano de la komputiloj.

La informobanko de historiaj objektoj estas la plej grava parto de la reto de ĉiuf flankaj informoj de la muzeo. Por ke la objektoj fariĝu komuna riĉaĵo de la homaro, la muzeo decidis malfermi sin al la tuta socio, kiam ĝi planis la sintezan ret-sistemon. Post nelonge, surbaze de funkciigo de la regiona reto, la muzeo konektos sin en pli larĝa reto kaj tiam oni povos ĝui la objektojn de la muzeo en sia hejmo pere de telefon-voko. ■

Estas bonvenaj represoj kaj tradukoj el "El Popola Ĉinio" kun indiko de la fonto, kaj la redakcio kore petas ties specimennon.

# Naturparko de ruĝvertaj gruoj

Teksto kaj fotoj de SUN SHUQING

En la regiono Zhalong sudoriente de Qiqihar, Ĉinio, kuŝas vasta marĉo, abunda je fragmitoj kaj fiŝoj, kie vivas birdoj de pli ol 200 specoj, inkluzive de ruĝvertaj gruoj.

En 1979 oni starigis tie la naturparkon Zhalong. Nun en la mondo vivas gruoj de 15 specoj, el kiuj ses sin trovas en la naturparko, kie estas pli ol 200 raraj ruĝvertaj gruoj graciaj, mildaj kaj singardemaj. Kiam venas printempo, ili reflugas al la naturparko de la baseno de Yangzi-rivero, kie ili travintras.

Frua somero estas tempo de fekundigo de ruĝvertaj gruoj. Tiam fakuloj remas al fragmitejo por observi, kiel ruĝvertaj gruoj konstruas neston, ellasas ovon kaj faras kovadon kaj kiel iliaj idoj elkoviĝas kaj lernas flugi. Por sia laboro la fakuloj devas pasigi kelkajn monatojn en la marĉo. Post pli-ol-dekjara esplorado ili havis pli multajn sciojn pri ruĝvertaj gruoj, kio helpis homan bredadon de tiuspecaj birdoj.



Bredado




1. Reveno
2. Ruĝvertaj gruoj
3. Idoj
4. Familio de ruĝvertaj gruoj
5. La naturparko Zhalong

1	4
2	3







# Kiom forta estas la vivo?

de FANG FANG


**M**I konis iun maljunulon antaŭlonge. Li estis parenco de mia najbaro. Ofte li venis el malproksima loko por viziti lin. Kviete sidante, li senlace babilis kun li en kampara dialekto. Kelkfoje mi enmiksitis min en ilian konversacion. Li neniam montris sin indiferenta kontraŭ mi, knabineto. Ĉiam mildis lia tono kaj kvietis lia mieno. Sur lia vizaĝo oni malfacile legis ion pri liaj travivaĵoj. Jen kial mi ege surpriziĝis, informiĝinte de mia najbaro pri lia malfeliĉo.

Junaga, li perdis siajn gepatrojn. Poste li plenkreskis, edziĝis kaj vivis feliĉan vivon. Sed neatendite, kiam li estis mezaĝa, lia edzino forpasis pro malsano, postlasante al li du filojn kaj unu filinon. Li devis vivteni la junajn gefilojn. Vidante ilin grandiĝi tagon post tago, li iom trankviliĝis. Tamen iun someran tagon de la 60-aj jaroj liaj filoj dronis en rivero dum naĝo. En Ĉinio cirkulas antikva popoldiro: "Por homo nenio estas pli dolora ol perdi la gepatrojn en infaneco, edzinon en mezaĝo kaj filon en maljuneco." Ĉion tion suferis la maljunulo. Restis al li nur lia

solfilino, kiu laboris aliloke post diplomiĝo el universitato. Sed katastrofo refoje atakis lin: iun vintran nokton de la 70-aj jaroj lia filino estis murdita. La kialon oni ne konis ĝis hodiaŭ. Li rimarkinde velkis, turmentite de la korŝira malfeliĉo. Kvankam oni povis legi el liaj okuloj la tristecon profunde kaŝitan en lia koro, tamen li, ĉiam kun milda voĉo kaj kvieta mieno, volis kompatigi neniun per sia aflikto.

Ofte ni ne komprenas, kiom da premforto povas elteni la homo kaj kian fortecon havas la vivo. Tamen ni bone scias la malfortecon de la vivo. Oni ofte perdas racion pro malsukceso en ekzameno aŭ promociiĝo, pro malpaco kun najbaro aŭ kolego, pro disiĝo de amanto, pro familia konflikto kaj eĉ pro multaj bagateloj. Resuminte la vivon de diversaj homoj, prudentuloj veas, kiom malforta estas la vivo.

Tamen estas tiaj homoj, kiuj, eltenante ĉiajn suferojn, prudente, memfide kaj persiste vivas sian vivon. Ŝajnas al mi, ke la menciita maljunulo volis montri per siaj travivaĵoj, kiom forta estas la vivo. ■



# ĈIU FLORO ESTAS BELA

de PANG NAIYING



Prof. Guo Yizong

**O**KTOBRE de 1996, profesoro Guo Yizong okazigis ekspozicion de siaj pentraĵoj en la Ĉina Belarta Domo en Pekino. Iu 88-jara maljunulo kun lambastono longe staris antaŭ la pentraĵo “Maduko-floro”, kiun Guo Yizong dediĉis al la baldaŭa restarigo de la suvereneco de Ĉinio super Hongkong. Maduko (*Madhuca hainanensis*) estas arbo, kiu de antikveco ekzistas en suda Ĉinio. Legendo diras, ke antaŭ 2 000 jaroj, en la ĉefurbo tri fratoj intencis dividi la familion. Kiam ili estis hakontaj la madukon, ĝi velkis. Tiam la plej aĝa frato komprenis: ni fratoj, kiel ĝiaj branĉoj, havas komunan radikon kaj estas nedisigeblaj. Do la fratoj rekuniĝis, ili pli kaj pli feliĉiĝis kaj la arbo reproduktiĝis.

Pro tio oni elektis maduko-floron kiel emblemon de la Speciala Administra Distrikto Hongkong kaj blazonon de ĝia flago. Guo prenis tion kiel temon de sia pentraĵo, sed ĉu la maljunulo komprenis la signifon?

La sekvantan tagon revenis la maljunulo kun sia poemo, ĉar rigardinte la pentraĵon, li imagis, ke la maduko-floro iĝis nacia flago de Ĉinio flirtanta en Hongkong.

“Li komprenas, li konas la esencon,” diris Guo. La maduko-floro sur la pentraĵo montras, ke pasis 100 jaroj, kaj Hongkong revenos al la patrolando. Tradicia metodo ne sufiĉas por esprimi la penson de Guo, kiu pentris do la florojn kaj foliojn per valoraj ora kaj arĝenta farboj. La pentraĵo estas plena de gajeco kaj forto.

La 57-jara Guo Yizong laboras en la fakultato de ĉinstila pentrado de la Centra Belarta Instituto de Ĉinio. Post multjara studado kaj esplorado li kreis novan stilon “Granda Floro”.


Antikvaj pentristoj de Ĉinio alte taksis bambuon, orkideon, umefloron kaj krizantemon. Ili pentris tiujn florojn por montri sian noblecon kaj ele-

gantecon. Guo opinias, ke se oni blinde sekvas antikvulojn, la pentraĵoj pri floroj perdos sian vivipovon. Li donis novan enhavon al sia pentraĵo — “sovaĝeco” kaj “spirito” de herbo, ĉar en liaj okuloj, ĉiuj floroj kaj herboj estas egalaj, sovaĝa herbo havas eĉ pli fortan vivipovon. Li ŝatas vortojn de franca ĝardenistika fakulo: “La herbo sovaĝa ĉe vi estas floro bela laŭ mi.” Ĉar li havas naturan guston por beleco, do lia pentraĵo havas pli ampleksan temon — ĉiu floro estas bela, ĉiu herbo havas aromon. Lia pentraĵo “En aŭtuno” temas pri sovaĝa floro kreskanta ĉe rivereto.

La pentraĵoj de Guo esprimas ankaŭ modernan koncepton pri medio-protekto. En 1992 li vizitis la Centran Oficejon de Medio-Programo de Unuiĝintaj Nacioj en Nairobi de Kenjo. Tie li vidis eritrinojn (*Erythrina indica*) kun fajroruĝaj floroj, kiuj rememorigis lin pri io vidita antaŭ dekkelkaj jaroj: en suda Ĉinio oni forbruligis arbojn por havi kampojn. La arboj cindriĝis, sed la lianoj brulis ankoraŭ tra la monto. Fine la plano kondukis al katastrofo, ĉar la kampoj dezertiĝis post nur unu rikolto de maizo. Li pentris “Mia Nairobi-Manifesto” kun la signifo: La naturo estas patrino de la homaro. Protektu ĝin, protektu vian hejmon, donu al viaj posteuloj belan mondon kun floroj. Li uzis ruĝan koloron anstataŭ la verdan por emfazi la temon.

Pro sia koncepto pri naturo, Guo Yizong ne ŝatas kiel antikvuloj esprimi sian ĝojon aŭ ĉagrenon per unu aŭ du floroj, sed substrekas la intimecon de homo kaj naturo kaj forton de vivo. Tiel liaj pentraĵoj ne kiel tradiciaj ĉinstilaj pentraĵoj havas multe da neplenigita spaco. La intensaj koloroj de la pentraĵo donis fortan impreson al la okuloj kaj sentigis la tutecon de la naturo. Guo opinias, ke la koloro estas la plej bela kaj valora donaco de la naturo por la homaro, kaj ĉiuj, kiuj amas la vivon kaj naturon, certe ŝatas la koloron. ■











1. "Maduko-floro"
2. "Mia Nairobi-Manifesto"
3. "En aŭtuno"
4. "La Okcidenta Lago post pluvo"

1	3
2	4



# Informoj pri Hongkong

## (II)



En Hongkong-a servejo de komercaj informoj

### INDUSTRIO

De la 50-aj jaroj la Hongkong-a ekonomio rapide disvolviĝis. La totala produktovaloro en la 50-aj jaroj kreskis ĉiujare meznombro je 7%, tiu en la 70-aj jaroj — je 19.3% kaj tiu en 1995 atingis 142.5 miliardojn da usonaj dolaroj, kaj la pokapa jara enspezo superis 23 000 usonajn dolarojn tiujare.

La ekonomia bazo de Hongkong estas industrio kaj precipe la konfekcia kaj elektronika industrioj, produktado de ludiloj kaj horloĝoj. En la 60-aj jaroj la produktovaloro de konfekcio okupis la unuan lokon de la totala industria produktovaloro de Hongkong kaj en la 70-aj jaroj ĝia eksporta kvanto konsistigis 40% de tiu de Hongkong. En la 60-aj jaroj en Hongkong aperis industrio de ludiloj kaj de post la 70-aj jaroj ĝia produktovaloro kreskis je 30% ĉiujare. En la 80-aj jaroj prosperis en Hongkong la horloĝo-produktado kaj en la 90-aj jaroj ĝia eksporta kvanto okupas ĉiam la 2- aŭ 3-an lokon de tiu de la mondo. La elektronika industrio de Hongkong, kvankam leviĝis malfrue, tamen disvolviĝis rapide. En 1996 en Hongkong funkciis pli ol mil elektronikaj entreprenoj, kies eksporta valoro konsistigis pli ol 25% de la totala eksporta valoro de Hongkong.

En Hongkong la entreprenoj plejparte estas ne-grandaj. En 1995, pli ol duono de la fabrikoj havis ĉiu malpli ol 50 laboristojn. La nombro de la fabrikoj dungitoj iam superis milionon, kiu nun tamen reduktiĝis al malpli ol 350 000, ĉar de post la 70-aj jaroj leviĝis iuj novaj industrioj, fabrikoj transiĝis de Hongkong al la ĉina ĉeftero kaj la antaŭaj labor-koncentritaj industrioj estis anstataŭitaj de la kapitalokoncentritaj kaj altteknikaj. Dank' al tio, la Hongkong-a industrio eniris en novan etapon.

### “PARADIZO DE KLIENTOJ”

Hongkong ĝuas la nomon “paradizo de klientoj”. Tie troviĝas dekmiloj da komercaj centroj, superbazaroj, magazenoj, mezgrandaj vendejoj kaj malgrandaj butikoj.

Pro historiaj kaŭzoj formiĝis en Hongkong multaj komercaj stratoj, kiaj “strato de kosmetikaĵoj kaj aliaj virinaj ornamoj”; “vira strato”, kie vendiĝas varoj uzataj de viroj, kiaj fajriloj, raziloj, ledŝuoj kaj rimenoj; strato, kie funkcias fotejoj por novaj geedzoj kaj vendejoj de nuptaj vualoj kaj roboj; eŭropestilaj stratoj de bufedejoj kaj kafejoj; strato de jadaĵoj k.a. En Hongkong oni povas ne nur aĉeti plej laŭmodajn vestojn en mondfamaj magazenoj, sed ankaŭ ĝui lokajn morojn en malgrandaj butikoj.


En Hongkong vendiĝas varoj el pli ol 160 landoj kaj regionoj, la prezo de iuj el ili estas malpli kara eĉ ol tiu en la produktolokoj.

### FINANCA CENTRO DE LA MONDO

En Hongkong cirkulas popoldiro: “Bankoj estas pli multaj ol rizvendejoj”. Laŭ statistiko Hongkong nun havas pli ol 180 bankojn kaj pli ol 1 300 bankfiliojn. 85 el la 100 mondfamaj bankoj havas siajn filiojn tie. La lastaj funkcias kiel financa apogilo de Hongkong.

Geografie Hongkong troviĝas meze de Ameriko kaj Eŭropo. Funkciante ankaŭ en paŭza tempo de amerika kaj eŭropa financaj merkatoj dum la 24-hora negocado, la Hongkong-a servas kiel stafetpunkto por internaciaj financaj merkatoj en la negocado. Krome, Hongkong estas unu el la 10 plej grandaj akciaj merkatoj kaj la tria granda ora merkato en la mondo post Nov-Jorko kaj Londono. ■





# Fascinanta Dunhuang

## (II)

Teksto de **PANG NAIYING**

Fotoj de **HAN HONG**

**A**L la krutaĵoj ĉe la orienta flanko de la Bruanta Sablomonto alkroĉiĝas diversgrandaj ŝtonkavernoj, kiuj ĉiujare allogas multajn ĉinajn kaj alilandajn pilgrimantojn kaj turistojn. Ili estas Mogao-ŝtonkavernaro, konata kiel arta trezorejo de la homaro. Kio do konserviĝas en ĝi?

### MONDO DE BUDHO-STATUOJ

En la kaverno diversas statuoj de budhoj predikantaj, meditantaj, floro-disĵetantaj, muzikoludantaj kaj luktantaj kun demonoj. Inter ili estas 33-metre alta statuo de Majtrejo kaj malpli-ol-5-centimetre alta statuo de infanobudho ludanta inter lotusfloraj petaloj.


Mogao-ŝtonkavernaro estis loko, kie antikvaj Dunhuang-anoj preĝis kaj kulturis sin, kaj ankaŭ loko, kie bonzoj kaj komercistoj petis benadon de la Budho antaŭ ol ekveturi al mez- kaj okcidentaziaj landoj laŭ la Silka Vojo. Por gajni favoron de la Budho, tiam en Dunhuang furoris diversaj budhoservoj, kiaj konduko de budhismo al internaj partoj de Ĉinio, sutro-transskribado far ĉiu familio kaj ŝafo-ofero al templo. Nemalmultaj bonzoj funkciigis

lernejon, kuracis popolanojn kaj faris terkulturadon.

Iuj freskoj en la kaverno bildigas la supre menciitajn aktivadojn, aliaj temas pri rakontoj de la budhisma sutro. Ekzemple, estas bildo "Nutrado de Satvo al Tigroj". Satvo estis princo. Iutage li vidis en arbaro tigrinon kaj ĝiajn idojn mortontajn de malsato. Por savi ilin li pikis al si la kolon per ligna pikilo, ke ili suĉu lian sango kaj formangu lin. Tio mon-

tras la bonkorecon kaj sinoferecon, predikitajn de budhistoj. En alia bildo mi vidis grupojn kaj grupojn da ĉinaj kaj alilandaj bonzoj kun koloraj sutro-flagoj en la mano marŝantaj sur la Silka Vojo. Ĝi rememorigis al mi bonzon Lezun. En la jaro 366 li vojaĝis al la Bruanta Sablomonto. Subite li vidis kvazaŭ la spektaklon de mil budhoj kun aŭreolo. Li do komencis fosi tie la unuan ŝtonkavernon. Post tio dum mil jaroj Dunhuang-anoj sekvis lian

SKEMA MAPO DE LOKOJ ĈE SILKA VOJO






**En niêo**



**Huxuan-danco**









En paradizo



Palaca orkestro





ekzemplon kaj fosis multe da ŝtonkavernoj. Nun en Mogao-ŝtonkavernaro estas 492 kavernoj, pli ol 3 000 koloraj argilaj statuoj kaj 45 000 kvadrataj metroj da freskoj.

## LA SILKA VOJO SUR FRESKOJ

Ankaŭ la freskoj en la ŝtonkavernaro prezentas la Silkan Vojon siatempan: Karavanoj kun kameloj ŝarĝitaj per silko malfacile marŝas inter altaj montoj. Kamelo estas falinta de sur monto. La mastro levas la falintan silkon. Rabistoj rabas kun armilo... La mastro preĝas al Avalokiteŝvaro, kaj ĉi tiu venas lin savi, ke glavoj levitaj de rabistoj estas rompitaĵoj en tri partojn.

Historia libro notas, ke en la komenco de la 17-a jc portugala vojaĝisto Benort de Goës kaj lia karavano el 500 personoj estis pirabitaj sur la Silka Vojo. En la libro estas skribite: "Rabistoj sin kaŝas supre de monto. Kiam la karavano preterpasas la monton, ili ĵetas al ĝi ŝtonojn. Kaj multaj el ĝi estas vunditaj." En Tang-dinastio (618-907) ĉinaj bonzoj kaj okcident-aziaj komercistoj vojaĝis kune sur la Silka Vojo. Pro hastado al komercado dekoj da okcident-aziaj komercistoj ekvojis nokte sen sciigi la ĉinajn bonzojn. Irinte pli ol kvin km, ili trafis rabadon kaj estis mortigitaj. La dezerto okcidente de Dunhuang estis konata kiel "maro de la morto". Historia libro diras: "Por transiri ĝin oni prenis skeletojn de vojaĝintoj sur ĝi kiel vojmontrilon." Pli okcidente de ĝi imponas Tianshan-montaro. Por transiri glacifluojn en ĝi oni devis fari glacian eskalon. Kiam eminenta bonzo Xuanzang de Tang-dinastio pilgrimis al la Okcidento por studi sutron, lin trafis lavango en la montaro. Multaj el liaj sekvantoj kaj bovoj mortis de frosto. Pamiro 7 000 m alta super la marnivelo, kiu tuŝas okcidentan Xinjiang, abundas je krutaĵoj. Oni ilin transiris unu post alia helpe de ŝnuro.

Kaj oni travadis riveron pere de dika ŝnuro super ĝi. Foje okazis tie neĝoŝtormo kaj pli ol 10 000 komercistoj mortis de frosto. Tial ĉiuj senditoj, komercistoj kaj bonzoj senescepte benopetis de la Budho kaj eĉ donacis monon por konstrui kavernojn en Dunhuang.

La Silka Vojo kunfandis la kulturojn orientan kaj okcidentan. Sur freskoj en la ŝtonkavernaro la mez- kaj okcident-aziaj nudaj bodisatvoj kun pufaj mamoj kaj gracia talio portas lozajn vestojn. La freskoj en la kaverno n-ro 45 montras, ke en la 12-a jc la bodisatvoj vestis sin per jupo el gazo kaj mallongan veston kun malalta kaj larĝa kolumo laŭ modo de Tang-dinastio, sin beligante per persaj orelingoj kaj hinda koliero.

Aparte mirindas Huxuandanco prezentata de fresko en la kaverno n-ro 220. Sur la fresko kvar belaj knabinoj rapide turniĝadas sur ronda tapiŝeto kun nigra hararo kaj longaj jupoj kaj rubando flirtantaj. Ankaŭ Huxuandanco estis enkondukita en Ĉinion tra la Silka Vojo. En la jaroj 712-755 ĉiuj korteganoj, la edzino kaj kromedzinoj de imperiestro de

Tang-dinastio lernis Huxuandanco. Oni diras, ke Yang Yuhuan, unu el la kromedzinoj de imperiestro Xuanzong, estis favorata pro siaj beleco kaj lerteco en Huxuan-danco. Siatempe eĉ eminentaj hunaj dancistoj povis funkcii kiel ŝtatoficistoj en la kortego.


Fresko de la kaverno n-ro 220 figuras bodisatvon kun glaso en la mano. Videblas likvaĵo en ĝi kaj la fingroj ĝin tenantaj. Evidente, ĝi estas vitra glaso produktita en lando ĉe Mediteraneo.

## SURMURA MUZEO


Alilanda stomatologo ĉagreniĝis pro manko de materialoj pri origino de dento-brosado. Hazarde li trovis la respondon en la bildo "Tonsurado" en la ŝtonkavernaro. Ĝi temas: Por fariĝi pia budhisto, oni devas antaŭ ĉio sin purigi kaj akcepti tabuojn. Ĉiuj akceptintoj en la bildo raziĝas kaj baniĝas. Inter ili kalva bonzo kalkansidas kun nuda torso. Li viŝas al si dentojn per la dekstra mano kaj tenas per la maldekstra tason kun dentobrosa similaĵo ene. La bildo havas historion de 1 200 jaroj. Historia noto montras, ke jam



Alilandaj turistoj en ŝtonkaverno



**La ŝtonkavernaro Mogao**  
Foto de SUN ZHIJIANG



**Ligna pagodo ĉe Mogao**



**Restaŭrado de budho-statuo**



**Kopiado de fresko**



**Komputila kontrolo de temperaturo en ŝtonkavernoj**



antaŭ 3 000 jaroj ĉinoj kutimis purigi la buŝon matene. En la jaroj 25-220 oni purigis siajn dentojn per droga aŭ sala likvaĵo. En la 10-12-aj jc ĉinoj povis fari dentobrosos el kolharoj. Legiĝas la noto: Se oni brosas la dentojn per glediĉia likvaĵo, oni ne suferas de dent-malsano. La osto-tenila dentobroso elterigita en 1953 el antikva ĉina tombo estis farita je 800 jaroj pli frue ol la unua dentobroso de Eŭropo produktita en 1780.

Por interpreti budhisman sutron antikvaj ĉinoj ilustris ĝin per freskoj, en kiuj ili ankaŭ prezentas la scenojn de plugo, ĉaso, akupunkturo, mokso, ferfando, rizpisto, vinfarado kaj teksado. Iuj freskoj figuras diversajn konstruaĵojn de la antikva Ĉinio, tio estas valora materialo por studi pri konstruaĵoj ekzistantaj en la 3-8-aj jc. Jam antaŭ 3 000 jaroj ĉinoj nomis malliberejon ronda korto. Oni enŝlosis en ĝi krimulojn kaj tiuj, kiuj fuĝis el ĝi, estis kondamnitaj al morto. Kia ĝi estis efektive? Neniu scias. Pluraj freskoj en la ŝtonkavernaro prezentas ĝian originalan formon: Ronda korto kun ramita ĉirkaŭmuro, sur kaj ĉirkaŭ kiu estas veproj. La korto similas al groto de prahomoj. Tie mi plurfoje vidis similajn grotojn, kiuj poste servis al paŝtistoj kiel ripozejo kaj nun estas uzataj kiel tenejo.

La "paradizo" en fresko vidiĝas la mondon, kie unufoja semado rikoltigas sepfoje en la jaro, arboj donas vestojn, homoj estas longvivaj, virinoj edziniĝas en aĝo de 500 jaroj... Kompreneble tio estas romantikaj revoj de la ĉinaj antikvuloj


## DUNHUANGOLOGIO KAJ PROTEKTO DE LA ŜTONKAVERNOJ

En 1900, kiam taoisto Wang Yuanlu reordigis la ŝtonkavernon n-ro 16, li malkovris sekretan kavernon, en kiu konserviĝis almenaŭ 50 000 sutraj klasikaĵoj, dokumentoj kaj aliaj objektoj inter la jaroj 359 kaj 1006. Ili temas pri

politiko, ekonomio, milit-afero, historio, religio, filozofio, medicino, astronomio, geografio, nacio, folkloro, literaturo kaj arto. Kvar kvinonoj de ili tamen estis forportitaj aŭ forŝtelitaj de aliaj landoj.

de la ŝtonkavernaro; enverŝo de likvaĵo kun malmoligaĵo en flusablon kaj provizado de ĉiuj kavernoj per hermetikaj pordoj kaj fenestroj.

Multaj freskoj pli-malpli de-



**Sablo-barilo**

Tio vekis grandan atenton de diverslandaj fakuloj. Jen naskiĝis Dunhuangologio por studi la ŝtonkavernojn, historiajn dokumentojn kaj geografion de Dunhuang. En la pasintaj pli ol 90 jaroj, dank' al la kunlaboro de ĉinaj kaj alilandaj fakuloj, estis gajnita granda sukceso en studo pri Dunhuangologio kaj la ŝtonkavernaro estis alte taksita. En 1987 ĝi estis enlistigita de Unesko kiel heredaĵo de la monda kulturo.

Tamen la ŝtonkavernaro estas minacata de flusablo kaj erozio. Protekti ĝin estas tasko aparte urĝa. Por tio ankaŭ antikvaj ĉinoj faris multon, kiel ekzemple, forigi flusablon kaj ripari kornicajn vojojn. Malgraŭ tio nemalmultaj kavernoj estis englutitaj de flusablo.

En la lastaj jaroj ĉinaj sciencistoj alprenis fizikajn kaj kemiajn rimedojn por bari sablofluadon: Plurobla sablo-barilo supre

truiĝis pro tro da vizitado. En la kaverno n-ro 94 mi vidis, ke riparantoj injektas koheraj-likvaĵon al ŝvelaĵoj de freskoj. Poste, ili singardeme premis la ŝvelaĵojn unu post alia per silka bulo kun vato ene. Por kuraci "dermozon" de fresko oni uzas malsamajn receptojn de la likvaĵo. En la ŝtonkavernaro naĝas multaj spormicetoj. Ili estas tromultiĝemaj en aero plena de karbana dioksido kaj detruas freskojn kaj rokojn. Eksperimento pruvis, ke la enteno de karbona dioksido en ŝtonkaverno, vizitita de dekelkaj vojaĝantoj dum duonhoru, estas sesoble pli granda ol tiu en la nevizitita. Tial, la ŝtonkavernaro malfermiĝas alterne al la publiko kaj oni kontrolas la aeron en ĝi per komputilo. El tio evidentiĝas, ke protekti la antikvan ŝtonkavernaron estas tute nova tasko por ĉinaj sciencistoj. ■

YI ZHOU:

# DEFIE AL ALTAJ MONTPINTOJ DE LA MONDO

**S**UR nia terglobo estas 14 montpintoj ĉiu kun alto de pli ol 8 000 m super la marnivelo. En 1993 la Tibeta Montgrimpa Ekspedicio de Ĉinio intencis grimpi sur tiujn 14 montpintojn, kaj ĝis nun 6 el ili jam estis konkeritaj. La 5-a montpinto, kiun ili ascendis, estis Nanga Parbat (8 125 m), la 13-a alta en la mondo. Ĝi imponas en la pakistana parto de Kaŝmiro. La 8 membroj de la ekspedicio surgrimpis multajn montpintojn, tamen Nanga Parbat plej profunde impresis ilin.

Forlasinte Islamabadon, ĉefurbon de Pakistano, ili suferis de varmego kaj manko de manĝaĵoj dum 7-taga marŝado kaj preskaŭ elĉerpiĝis, atinginte la ĉefstabejon sur Nanga Parbat en la loko je 5 160 m super la marnivelo.

En la ĉefstabejo aŭdiĝis tage kaj nokte tondraj bruegoj de lavango similaj kaj al salutaj salvoj kaj al teruraj krioj de monta dio. Post 4-taga preparado la ekspedicio ekgrimpis sur la 2-an pinton de Nanga Parbat. La 8 ekspedicianoj unue venis en la marŝokampadejon je 5 300 m super la marnivelo. En la sekvanta tago la grupo A, konsistanta el 4 membroj, Ciren Duoĵi (Cifen Dūoĵi), Bianba Zhaxi (Bjanba Ĝaŝji), Luoze kaj Akbu, ekgrimpis direkte al la kampadejo n-ro 1. Luoze diris poste, ke la zono inter la ĉefstabejo kaj la kampadejo n-ro 1 estis la plej danĝera kaj terura vojo, kiun li iris dum sia montgrimpa vivo. En la zono kun glacifluoj troviĝis sen nombraj kaŝaj kaj malkaŝaj fendoj. Nokte frosto regis sur la neĝkovrita monto kaj glaciĝis la neĝak-



Ciren Duoĵi



Survoje

vo. Tage la arda suno krakigis la glacifluojn, iuj surfacoj sinkis kun granda bruo, kaj estiĝis malfacile transireblaj fendoj.

Kiam la grupo A eliris el tiu abomeninda zono kaj atingis la kampadejon n-ro 2, okazis io neatendita: la du lokaj helpantoj, kiuj portis tendojn, manĝaĵojn kaj trinkaĵojn, decidis ĉesi supreniri. Kion fari? Ĉu retiriĝi? Tio signifas malsukceson. La 4 ekspedicianoj serĉis en siaj poŝoj. Akbu trovis 4 biskvitojn kaj 3 ĉokoladojn, dum Luoze saketon da glukozo. Grupestro Ciren Duoĵi diris: "Ni supreniru! Eble ni trovos malnovajn tendojn forlasitajn en la loko. Se ni ne mortos de frosto, ni certe atingos la montpinton."

Ili senhezite daŭrigis sian grimpadon. Feliĉe, post pli-ol-10-hora barakto ili atingis la kampadejon n-ro 3, kiu rekompencis ilin per 2 malnovaj tendoj. Boliginte poton da akvo per malgranda gasujo, ili trinkis po unu tason da glukozaj trinkaĵoj, manĝis po unu biskviton kaj duonon da ĉokolado.

Je la 4-a matene, la 4 ekspedicianoj direktis sin rekte al la 2-a pinto de Nanga Parbat. Pro deklivo tro kruta kaj neĝa tavolo tro dika, ili malrapide supreniris unu post alia. Bianba Zhaxi kaj Luoze alterne malfermis la vojon. Finfine, post 9 horoj, la 4 bravuloj konkeris la 2-an pinton de Nanga Parbat kaj levis tie la nacian flagon de Ĉinio.

Ekventis. Tio estis altituda ventego. Muĝante, ĝi kvazaŭ volus levi ĉiujn homojn kaj objektojn de sur la 2-a pinto de Nanga Parbat kaj ĵeti ilin en valon. La ekspedicianoj tuj malsupreniris. Evitante lokojn kovritajn de profunda neĝo, kie povis okazi neĝfluo, ili malrapide descendis laŭ rokoj kun glacio. Pli granda danĝero minacis ilin: dense nebulis kaj sekvis vespero. Ili vidis nenion 3 m malproksime. Kie estis la kampadejo? Ili perdis preskaŭ la vojon. Maltrankviligis eĉ Ciren Duoĵi, iam staranta 99 minutojn sur Ĉomolangma, la plej alta montpinto de la mondo. Jam 2 tagojn ili manĝis nenion kaj kaptur-niĝis pro manko de oksigeno. Iom da nesingardeco povus tuj faligi ilin en profundan valon. Li forte streĉis ĉiujn siajn sensorganojn por trovi la direkton. Ĝin rekoninte, li laŭte kriis: "Trankviliĝu, ni estas en ĝusta direkto. Ni certe atingos la ĉefstabejon." Finfine, ili revenis en la kampadejon n-ro 3 kaj ĝoje renkontiĝis kun la ekspedicianoj de la grupo B.

Forta altituda vento kaŭzis grandan danĝeron al la grimpadon de la B-grupanoj. Se ili atendus plu, tempo kaj manĝaĵoj konsumiĝus kaj ili mem estus elĉerpitaj. Ili decidis do supren grimpi malgraŭ vento.

La frosta ventego estis tiel forta, ke la ekspedicianoj ne povis paroli. Dum pluraj horoj silentis radiotelefono. Tiam ili estis tutforte suprenirantaj paŝon post paŝo pere de iloj. En kava loko ili haltis kaj volis daŭrigi ion, sed ventego implikis ilin, kiuj povis fari

nenion alian ol daŭrigi la grimpadon. Kiam Sangzhu, ilia estro, estis ege maltrankvila en la ĉefstabejo, aŭdiĝis en radiotelefono: "Ni atingos la montpinton post 40 minutoj." Je tio Sangzhu serenigis la frunton. Finfine, post 7-hora batalo kontraŭ neĝstormo, ankaŭ Wangjia (Ŭangĝja), Jiabu (Ĝjabu), Renna kaj Daqiong (Daĉjong), membroj de la grupo B, konkeris la 2-an pinton de Nanga Parbat.

Post 2-taga ripozo en la ĉefstabejo la ekspedicio komencis grimpi la 1-an pinton de Nanga Parbat. La pintoj 1-a kaj 2-a majeste staras unu apud la alia. En la unuaj 3 tagoj ĉio estis en ordo. La 8 ekspedicianoj sukcese atingis la kampadejon n-ro 2 en la loko je 6 900 m super la marnivelo. Neatendite, ekneĝis. Jam 2 tagojn neĝis senĉese, kaj la neĝa tavolo dikiĝis je pli ol 10 cm ĉiuhore. Ĉu daŭre atendi aŭ retiriĝi? Sangzhu tuj decidis: La ekspedicio sin retiru en neĝo.

Post kiam la ekspedicio revenis en la ĉefstabejon, neĝo daŭris pliajn 5 tagojn kaj la neĝa tavolo fariĝis 2 m dika.

Dum tiuj neĝaj tagoj 7 alilandaj alpistoj perdis la vivon en Karakorum-montaro kaj i.a. 4 germanaj alpistoj dormas por ĉiam sub neĝo sur la 2-a pinto de Nanga Parbat. Bedaŭrinde, la Tibeta Montgrimpa Ekspedicio de Ĉinio ne sukcesis konkeri la 1-an pinton de Nanga Parbat. Je tio Luoze veis: "Fakte, ni bezonis nenion alian ol bonan veteron. 2 serenaj tagoj sufiĉus por ni ascendi la 1-an pinton de Nanga Parbat." ■

## ABONTARIFO DE EPĈ POR 1997

Lando	Valuto	Abonprezo	Sendokosto	Totalo
Aŭstralio	AUD	19,00	16,00	35,00
Aŭstrio	ATS	192,00	128,00	320,00
Belgio	BEF	575,00	375,00	950,00
Britio	GBP	10,00	6,00	16,00
Germanio	DEM	28,00	18,00	46,00
Finnlando	FIM	61,00	50,00	111,00
Francio	FRF	88,00	62,00	150,00
Israelo	USD	14,00	12,00	26,00
Italio	ITL	20200,00	13800,00	34000,00
Japanio	JPY	1700,00	1300,00	3000,00
Kanado	CAD	17,00	15,00	32,00
Nederlando	NLG	28,00	23,00	51,00
Nov-Zelando	NZD	26,00	22,00	48,00
Svisio	CHF	23,00	17,00	40,00
Usono	USD	14,00	12,00	26,00
TARIFO A	USD	14,00	12,00	26,00
TARIFO B	USD			15,00
TARIFO C	USD			10,00

**TARIFO A:** Ĉiuj landoj en Eŭropo escepte de tiuj menciitaj en la kategorio TARIFO C.

**TARIFO B:** Korea Respubliko, Singapuro, Hongkong, Turkio, Meksikio kaj ĉiuj landoj en Latin-Ameriko.

**TARIFO C:** Ĉiuj landoj de Orienta Eŭropo (inkluzive de Estonio, Latvio, Litovio, Komunumo de Sendependaj Ŝtatoj kaj eks-Jugoslavio) kaj ĉiuj ceteraj landoj en Azio kaj Afriko ne menciitaj supre.


Rim. Por aerpoŝta sendo bonvolu aldoni 10,00 usonajn dolarojn.



# La unua jaro de la Naŭa Kvin-jara Plano de Ĉinio

de HAN WEN

**1** 996 estis la unua jaro, kiam Ĉinio ekpraktikis la Naŭan Kvin-jaran Planon por Nacia Ekonomio kaj Socia Disvolviĝo kaj la Skizon por la Perspektivaj Celoj ĝis la Jaro 2010. Laŭ la plano la diversnaciaj popolanoj realigis la celon de



Bredejo de bonrasaj porkoj en Sichuan

makroreguligo de ekonomio, plenumis la ĉefajn taskojn de la nacia ekonomio kaj socia disvolviĝo kaj faris gravan paŝon por plenumi la Naŭan Kvin-jaran Planon.

## EKONOMIO KRESKANTA KAJ PREZARO MALALTIĜANTA

En 1996 la nacia ekonomio de Ĉinio daŭre kreskis kaj inflacio estis efike bridita, ke la procento de prezaltiĝo estis malpli alta ol tiu de ekonomia kreskado. En la lastaj jaroj antaŭ 1996 tro rapida altiĝo de prezaro malhelpis la disvolviĝon de la nacia ekonomio de Ĉinio. Lastjare la altiĝo de prezaro falis ĝis 6.1%, kio plibonigis la medion de ekonomio kaj defendis la interesojn de la konsumantoj. La totala enlanda produkto-valoro atingis 6 770 miliardojn da juanoj (ĉ. 816 miliardoj da usonaj dolaroj), pli multe ol tiu de 1995 je 9.7%. La industrio kaj trafiko disvolviĝis stabile, produkto-kvanto de ŝtalo superis cent milionojn da tunoj, produkto-kvanto de kemisterko atingis 26.6 milionojn da tunoj kaj tiu de aliaj

ĉefaj industriaj produktaĵoj atingis aŭ superis la celojn difinitajn en la plano.

## RIĈA RIKOLTO DE GRENO KAJ SUBPRODUKTADO DE KUIROLEO KAJ KOTONO

Lastjare Ĉinio gajnis la plej riĉan rikolton de greno en la historio kaj la totala produkto-kvanto superis 480 miliardojn da kg, pli multe ol tiu de 1995 je almenaŭ 13.4 miliardoj da kg. Viando, marproduktaĵoj, fruktoj, legomoj kaj aliaj kompare plimultiĝis. La produkto-kvanto de kotono kaj kuiroleo iom reduktiĝis pro malmultiĝo de prisemita areo. La vilaĝaj entreprenoj daŭre disvolviĝis kaj centra kaj okcidenta Ĉinio evoluis rapide. Kaj la malriĉaj popolanoj de la kamparo malmultiĝis je sep milionoj.

## PLIFORTIGI LA KONSTRUADON DE GRAVAJ PROJEKTOJ

Investo de fiksa kapitalo kreskis per 18.2% kompare kun tiu de 1995 kaj la strukturo de investo estis iel ŝanĝita. Konstruado de gravaj projektoj estis plue plifortigita. Investo de agrikulturo, forstumado, akvoutiligo, energio, trafiko, telekomuniko kaj elektronika industrio kreskis per procento pli granda ol la menciita. Pli ol 43% de la investo por la novaj gravaj projektoj de Ĉinio estis uzataj en centra kaj okcidenta Ĉinio. Ekfunkciis la Pekin-Kowloon-a Fervojo kaj Ŝanhaj-Nankina Ekspresa Ŝoseo, glate iris la konstruado de la Projekto de Tri Gorgoj de Yangzi-rivero kaj la triaperioda plikonstruado de la Baoshan-a Ŝtala Kompanio kaj komenciĝis la konstruado de la Turpan-Kaxgar-a Fervojo en Xinjiang kaj agrikultura ekspluatado de Shulehe en Gansu.

## STABILA SITUACIO EN FINANCO KAJ IMPOSTO

Lastjare financa enspezo multe kreskis, loka financa enspezo estis pli granda ol elspezo kaj la financa deficitado de Ĉinio estis limigita kadre de la buĝeto. La financa situacio estis en stabileco kaj emisiado de mono estis bridita. La nombro de rezervitaj fremdaj valutoj superis 100 miliardojn da usonaj dolaroj kaj la konverta tarifo de *Renminbi* (ĉina mono) estis en stabileco.

Kiam dogano malmultiĝis ĝenerale, la politikoj de importa kaj eksporta impostoj estis alĝustigitaj. La nombro de urboj, kiuj fondis urban kooperan bankon, atingis 100 kaj komenciĝis ĉiufanka reformado de financa sistemo en la kamparo. Reformado de financaj organizoj estis profundigita.


## PROFUNDIGI REFORMADON KAJ PLILARĜIGI PORDOMALFERMON

En 1996 stabile progresis la reformado de la ĉina

ekonomia sistemo. Plifortigis la reformado de ŝtataj entreprenoj. Oni faris eksperimenton en 58 urboj por plibonigi kapitalan strukturon. Bone iris aneksado de bankrotintaj entreprenoj, reduktado de iliaj ŝuldoj, enoficigo de iliaj superfluaĵoj kaj distingo de sociaj funkcioj, kaj ankaŭ reformado de asekuro por maljunuloj kaj senlaboruloj kaj garantiado de kuracservo. Pliprofundigis reformado de administra sistemo de ekstera komerco kaj fremda valuto kaj nombro da entreprenoj akiris la rajton mem eksporti produktaĵojn. *Renminbi* povis esti ŝanĝita en iuj cirkulkampoj kaj investa medio pliboniĝis. Lastjare la totala valoro de importaĵoj kaj eksportaĵoj atingis 289 miliardojn da usonaj dolaroj, pli multe ol tiu de 1995 je 3.2%. Importo kaj eksporto estis en fundamenta ekvilibro. Alilandaj komercistoj investis pli multe ol en 1995 kaj la investsumo ricevita estis pli ol 40 miliardoj da usonaj dolaroj. La politiko profundigi reformadon kaj plilargigi pordomalfermon akcelis la disvolviĝon de la ĉina ekonomio.

### **SCIENCO, TEKNIKO KAJ EDUKADO**

Lastjare estis 2 000 gravaj scienc-teknikaj fruktoj en Ĉinio kaj industriigo de scienc-teknikaj fruktoj rapidis paŝo post paŝo kaj teknika industriigo rimarkinde progresis. Novaj varioj de grenplantoj kaj kotonujoj kaj avangardaj agrikulturaj teknikoj estis disvastigitaj. En 50% de la urboj kaj gubernioj de Ĉinio realiĝis naŭjara deviga edukado kaj kvar



**Alitvakua olepumpilo en Lanzhou**

milionoj da junuloj kaj plenkreskuloj sin liberigis el analfabeteco. Estis 400 000 organizoj por profesia trejniĝo. Multaj sciencistoj, artistoj kaj kuracistoj servis al kamparanoj.

### **PLIBONIGI DIVERSAJN SOCIAJN SERVOJN**


En 1996 pokapa enspezo por vivteno de la urbanoj kreskis per 3.3% kompare kun tiu de 1995 kaj tiu de la kamparanoj per 9%. Provizo de konsumaĵoj estis riĉa, la prezo stabilis kaj sur merkato viglis aĉetado kaj vendado. Pli ol sep milionoj da urbanoj ricevis laboron kaj la senlaborula procento estis 3%. Estis konstruitaj loĝdomoj kun plankareo de 1.1 miliardoj da kvadrataj metroj. La loĝkvartala servo kaj sano-protektado en la urboj disvolviĝis pluen kaj la kondiĉoj de kuracado en la kamparo iagrade pliboniĝis. La socia saniga sporto iris paŝo post paŝo. Media protekto estis serioze atentata, serioze poluciantaj entreprenoj ne plu funkciis. Kaj la kreskanta procento de la loĝantaro estis limigita je 1.1%.

### **MALFACILAJ PROBLEMOJ SOLVENDAJ**

En la ekonomia disvolviĝo kaj socia vivo de Ĉinio ekzistas malfacilaj problemoj: La fundamento por stabiligi ekonomian disvolviĝon ne estas solida kaj ekonomia strukturo ne estas racia. Blinda kaj ripeta konstruado serioze malhelpas la plialtiĝon de kvalito, profito kaj efiko de la nacia ekonomio en tuteco. La bazo de agrikulturo estas kompare malforta, hidraŭlika konstruado postĝinta, kapablo batali kontraŭ katastrofo ne forta, ĉagreno pri loĝantara kreskado kaj enoficigo granda. Iuj ŝtataj entreprenoj havas malfacilojn en produktado kaj administrado. La profito ne estas bona kaj senlaboruloj plimultiĝas. Ĉinio havas kompare grandan malfacilon financan kaj la rilato inter enspezo kaj distribuo ankoraŭ ne estas reguligita. Kaj koruptiĝo ankoraŭ seriozas.

### **GRAVA JARO**

1997 estas grava jaro en la ĉina historio. Komence de 1997 la ĉina registaro ellaboris planon por la nacia ekonomio kaj socia disvolviĝo. Laŭplane, la ĉina ekonomio kreskos per 8% en la jaro, la prezoj kreskos iom malpli alte ol tiuj de 1996, agrikulturo estos metita en la unuan lokon de la nacia ekonomio, hidraŭlika konstruado estos plifortigita. Necesos aktive progresigi vilaĝajn entreprenojn, precipe tiujn en centra kaj okcidenta Ĉinio, plibonigi investa strukturon, serĉi novan vojon por disvolvi ekonomion, aktive plivastigi merkaton, plialtigi la nivelon de pordomalfermo, plirapidigi reformadon de ŝtataj entreprenoj, daŭrigi laboron por helpi malriĉulojn, enoficigi senlaborulojn, kaj plibonigi la vivon de la popolo. ■



Bambuaj slipoj de Jingmen

SUN AIJUN:

# *Bambuaj slipoj — libro antaŭ 2 000 jaroj*

**A**NTAŬ 2 000 jaroj ne estis papero. Tiam la ĉinoj faris noton, verkis libron kaj skribis leteron sur bambuaj kaj lignaj slipoj. Oni senŝeligis, tranĉis kaj normigis bambuajn kaj lignajn slipojn, skribis ideogramojn sur ili per tuĉpeniko, trempita en ĉina inko, kaj kunligis ilin. Tiuj antikvaj kaj historiaj libroj el bambuaj aŭ lignaj slipoj estis kunentombigitaj kaj nun fariĝis valoraj materialoj por historia studo.

Mi vidis tiajn slipojn en la muzeo de Jingmen en Hubei-provinco, centra Ĉinio. Hermetike metitaj en vitraj provtuboj, ili, malsamlongaj kaj karmezinaj, surhavas ideogramojn en la sigel-gravura stilo. Sinjoro Liu, esploristo de la muzeo, konigis, ke tiuj 804 bambuaj slipoj ĉiu kun longo de 15-32.4 cm kaj larĝo de 0.5-0.6 cm estis elterigitaj en la vilaĝo Guodian de Jingmen. 726 el ili surhavas entute ĉ. 16 000 ideogramojn, inkl. de kelkaj difektitaj. Kvankam ili kuŝis en la tombo pli ol 2 000 jarojn, tamen la skribsignoj sur ili estas tre klaraj ĉe la elteriĝo. Post antisepa traktado, aranĝado, rekonado, ordigo kaj riparado ili jam estis kompilitaj en librojn.

La ordigitaj bambuaj slipoj ampleksas 8 antikvajn verkojn, inkl. de taoismaj kaj konfuceanismaj klasikaĵoj. Ili estas valoraj kaj por korekti erarojn en la konataj libroj kaj por plenigi blankojn de antaŭe perditaj historiaj verkoj. Inter ili estis libro "Laozi", kiu montras la esencon de la primitiva filozofia penso de Laozi, fondinto de taoismo. Ĝi estas valora

materialo por esplori la filozofian penson de Laozi.

Oni ofte trovis bambuajn kaj lignajn slipojn en antikvaj tomboj en multaj aliaj lokoj de Ĉinio, tamen ili plejparte estas notoj pri landlimaj pasejoj kaj kontlibroj. Arkeologoj deziris trovi kompletajn librojn el bambuaj kaj lignaj slipoj. Kaj tiuj elterigitaj en Jingmen, grandnombraj, enhavoriĉaj kaj bone konservitaj, estas aparte valoraj. Ili vekis grandan atenton de la fakuloj ĉinaj kaj alilandaj.

Antaŭ pli ol 2 000 jaroj Jingmen estis nepra pasejo por Chu-regno al la baseno de la Flava Rivero. Ĝi, kiel centro de Chu-kulturo, havas riĉajn kaj valorajn kulturajn restaĵojn de Chu-regno. En la lastaj dek jaroj la lokaj arkeologoj elterigis kaj bonordigis grandnombrajn historiajn objektojn. Kune kun la supre menciitaj bambuaj slipoj, elteriĝis ankaŭ nombro da unuaklasaj historiaj objektoj protektataj de la lando, kiaj bronza spado, fera falĉilo, sepkorda liro kaj silkaĵo.

La bambuaj slipoj estis elterigitaj en la tombo n-ro 1, malgranda inter la tomboj de la vilaĝo Guodian. Proksime de ĝi kuŝas 278 tomboj altaj kaj malaltaj. Oni diris al mi, ke subtere sin kaŝas multaj aliaj tomboj kiuj nun ne vidiĝas pro longtempa erozio de vento kaj pluvo. Oni kredas, ke la modernaj homoj iom post iom konos la historion okazintan antaŭ 2 000 jaroj, dank' al la elteriĝo de la historiaj objektoj. ■



# Filatelilo en Ĉinio

de LI QIANG

*Ankaŭ pri filatelo vi havas ankoraŭ multe por skribi. Interese estas, kiel aspektas ĉe vi filatela organizaĵo, jaraj programo-bultenoj, kion faras filatelistoj informitaj pri nove aperigitaj poŝtmarkoj, kiaj estas kolektmanieroj laŭ diversaj grupoj aŭ temoj ktp.*

**Rudi IZLAKAR** (Slovenio)

**E**N 1878 Ĉinio emisiis la unuan serion da poŝtmarkoj kun titolo "Drako". Nelonge poste, en ĝi aperis poŝtmarko-kolektantoj. Komence de la kuranta jarcento multe evoluis filatelo en Ĉinio. En 1955 fondiĝis la Ĉina Filatela Kompanio kaj la gazeto "Filatelo".

Fine de la 70-aj jaroj filatelo fariĝis konsistiga parto de la kultura vivo de la ĉinoj. Pro kreskado de la vivnivelo de la ĉinoj furoras kolektado de poŝtmarkoj, almetmarkoj, monejoj, kaligrafaĵoj, pentraĵoj ktp. En Ĉinio estas pli ol 17 milionoj da filatelistoj, inter kiuj du milionoj aliĝis al filatelaj organizaĵoj.

En ĉiuj lokoj de Ĉinio aktivadas filatelistoj. Multaj institucioj, entreprenoj kaj lernejoj havas filatelan organizaĵon. Ĉiuj filatelaj organizaĵoj apartenas al la Ĉina Filatela Federacio. La filatelaj organizaĵoj respondecas pri aktivadoj de siaj membroj, kiaj filatela kurso, interŝanĝo de spertoj en filatelado,



**La aŭtoro (maldekstre) kaj liaj kolektitaj poŝtmarkoj**

ekspozicio de filatelaĵoj ktp.

Ne mankas en Ĉinio esperantisto-filatelistoj, inter kiuj iuj estas premiitaj en internacia filatela ekspozicio. En 1994, iniciate de la Ĉina Esperanto-Ligo, fondiĝis la Ĉina Filatela Esperanto-Asocio. Memore al tio, emisiĝis koverto desegnita de s-ino Ren Yu (Ĵen Ju). La asocio aranĝis ekspoziciojn de Esperantaj filatelaĵoj kaj emisiĝis memorigaj kovertoj tiurilate.

En la infaneco mi per poŝmono aĉetis nove emisiitajn poŝtmarkojn kaj plej ofte mi petis de aliaj stampitajn kovertojn. De tiuj kovertoj mi detranĉis la poŝtmarkojn kaj trempadis ilin en akvo, por ke ili estu

malgluitaj. Poste, mi konservis la sekigitajn kaj ebenigitajn poŝtmarkojn en la albumo. Estas tre malfacile kolekti kompletan serion da stampitaj poŝtmarkoj. Sur ĉiu peco de la poŝtmarko-serioj, emisiitaj post la fondiĝo de la nova Ĉinio en 1949, legiĝas la teksto, en kiu jaro ĝi emisiĝis,



En pekina bazaro de filatelaĵoj

ĉu ĝi estas memoriga aŭ speciala, kiun lokon ĝi okupas en la serio kaj kiom da pecoj havas la serio.

Kutime, oni grupigas poŝtmarkojn laŭ ties emisia dato kaj numero. Estas tre malfacile kolekti ĉiujn poŝtmarkojn emisiitajn post la fondiĝo de la nova Ĉinio. Tial, multaj komencas filateladon en memoriga tago (ekz., geedziĝo aŭ naskiĝo). Nun oni ĝenerale filatelas per aĉetado de nove emisiitaj poŝtmarkoj en serio.

En la pasintaj jaroj en Ĉinio aperis filatela merkato, kie aktivadis filatelaj komercistoj. La prezo de gravaj poŝtmarkoj kaj filatelaĵoj rapide plialtiĝis en ĝi. Iam same al la nove emisiitaj poŝtmarkoj. Tial, tre malofte okazis, ke oni afrankis sian leteron per tiuspecaj poŝtmarkoj. Ankaŭ pli kaj pli malfacilas kolekti ilin.

En 1979 fondiĝis la Ĉina Poŝtmarka Kompanio, kiu entreprenas ekskluzive desegnadon kaj eldonadon de poŝtmarkoj kaj donas filatelan servon al ĉinoj kaj alilandanoj. Ĝi havas siajn filiojn en diversaj lokoj de Ĉinio. Ili vendas mend-

kartojn al filatelistoj, per kiuj la lastaj povas aĉeti difinitan kvanton da nove emisiitaj poŝtmarkoj. Ĉiujare la gazeto "Filatelo" aperigas planon emisii poŝtmarkojn por la venonta jaro, la "Ĉina Filatela Gazeto" kaj televidaj stacioj publikigas desegnojn de emisiotaj poŝtmarkoj. Kaj plie, la filatela kompanio ankaŭ donas informon pri emisiado.

Krom poŝtmarkoj, filatelistoj kolektas ankaŭ unuataĝajn kovertojn kaj faldeblajn kartojn, al kiuj estas algluitaj nove emisiitaj poŝtmarkoj kun teksto pri ili. Ĝenerale dirite, por la ordinaj filatelistoj ne eblas aĉeti tiajn filatelaĵojn, kiaj ora kaj arĝenta kartoj.

Krom kolektado de ĉinaj poŝtmarkoj iuj filatelistoj kolektas ankaŭ alilandajn poŝtmarkojn. Ekz., mi aparte ŝatas kosmonaŭtikajn poŝtmarkojn kaj kolektis pli ol 600 ĉinajn kaj alilandajn poŝtmarkojn pri satelito, kosma sondilo, raketo kaj aerŝipo, kaj ankaŭ pri sporto, animalo, vegetalo, birdo, majstra pentraĵo ktp. La alilandaj poŝtmarkoj estas kolektitaj per korespondo kun eksterlandaj amikoj kaj per aĉetado en poŝtofiĉejo. Ĝenerale, alilanda poŝtmarko estas malpli multekosta ol la ĉina, tamen malpli facile kolektebla. Precipe sen katalogo de poŝtmarkoj oni ne klare scias, kiom da pecoj estas en poŝtmarka serio. Ofte okazas, ke oni povas aĉeti nur poŝtmarkojn malgrandvalorajn en la serio kaj grandvalorajn ne. ■

## Anonco

Ekde la januara numero de nia revuo, 1997, en kiu ni komencis la konkurson pri "Fotoj Faritaj de E-istoj", ni ricevis belajn fotojn faritajn de niaj legantoj. Ĉar ni premios nur tiujn fotojn, kiuj estis kaj estos publikigitaj en la numeroj 1-12, 1997, konkursantoj sendu al ni siajn fotojn kiel eble plej baldaŭ, por ke ni publikigu ilin en 1997.

Ni daŭrigos la rubrikon "Fotoj Faritaj de E-istoj". Ni atendas fotojn pri pejzaĝo, moro, festo ktp.

**La Red.**

## ANTIKAJAJ HUMURAJAJ

### *Aĉeti propran vinon*

**E**STIS maljunaj geedzoj tre drinkemaj. Tiu-tage ili, kun vazo da vino, iris al bazaro por vendi, interkonsentinte, ke ili ne trinku vinon senpage.

Transirinte monton, ili iom ripozis, kaj la maljunulo ekhavis la deziron trinki vinon. Li serĉis en sia poŝo, trovis moneron kaj demandis sian edzinon: “Ĉu mi povas trinki, se mi pagas?”



“Jes, kompreneble,” ŝi respondis.

Li donis al ŝi la moneron kaj trinkis du ĉerpilojn da vino. Vin-aromo vekis drinkemon de la maljunulino. Ŝi demandis sian edzon: “Ankaŭ mi povas trinki, se mi pagas, ĉu ne?”

“Certe.”

La maljunulino redonis la moneron al la maljunulo, kaj ankaŭ ŝi trinkis du ĉerpilojn da vino.

Tuj poste la maljunulo denove pagis al ŝi la moneron: “Mi trinku du pliajn ĉerpilojn da vino.”

Tiel la maljunaj geedzoj eltrinkis la tutan vazon da vino antaŭ ol atingi la bazaron.

### *Fari ĉapon*

**E**STIS avarulo, kiu ĉion domaĝis.

Foje li aĉetis malgrandan pecon da ŝtofo por fari ĉapon. Mezurinte lian kapon, la tajloro diris: “Bone, ĝi sufiĉas.”

Eldomiĝante, la avarulo pensis en si: “Ĝi sufiĉas? Certe ĝi estas pli ol sufiĉa.” Do, li returnis sin kaj demandis la tajloron. Ĉi tiu respondis al li: “Jes, ĝi estas pli ol sufiĉa.”

“Ĉu ĝi sufiĉas por du ĉapoj?”

“Jes, kompreneble,” ridetis la tajloro.

Eldomiĝante, la avarulo pensis denove: “Eble ĝi estas ankoraŭ pli ol sufiĉa!” Do, li returnis sin denove al la tajloro: “Ĉu ĝi sufiĉas por tri?”

“Ĝi sufiĉas eĉ por dek!” respondis la tajloro, kuntirante la brovojn.


Je tio la avarulo ege ĝojiĝis.

Tri tagojn poste, li venis al la tajloro por preni la ĉapojn. Ilin vidinte, li surpriziĝis. La dek ĉapoj estis tre malgrandaj. Li demandis kun kolero: “Ĉu tiuj malgrandaj ĉapoj taŭgas por la kapo?”

“Tamen ili taŭgas ĝuste por viaj dek fingroj,” respondis la tajloro.

“Ĉu vi faris ilin por fingroj?” flamiĝis la avarulo.


“Por kio do taŭgas la dek ĉapoj el tiom da ŝtofo, se ne por fingroj?” malrapide demandis la tajloro anstataŭ respondi.



Progreso kun ĉiu tago

Karikaturo de MIAO YINTANG





La militŝipo Zhongshan elakvigita

### MILITŜIPO ELAKVIGITA

La militŝipo Zhongshan, kiu dronis en la meza parto de Yangzi-rivero antaŭ 58 jaroj, estis elakvigita en la komenco de 1997 post pli-ol-du-monata laborado.

Ĝia elakvigo estis atentata de diversaj rondoj de Ĉinio kaj

ĉindevenaj eksterlandanoj pro ĝia neordinara pasinteco. Ĝia origina nomo estis Yongfeng. La militŝipo estis mendita de la registaro de Qing-dinastio en 1910 kaj enakvigis en 1913. En la Nov-demokratia Revolucio de Ĉinio ĝi multe suferis. Post kiam ĝi fariĝis speciala ŝipo por d-ro Sun Yatsen, gvidanto de la

nomita revolucio, ĝi estas atestaĵo de la moderna revolucia historio de Ĉinio. La 12-an de marto 1925 d-ro Sun Yatsen forpasis, kaj en aprilo la ŝipo Yongfeng alinomiĝis Zhongshan (t.e. Sun Yatsen). La 24-an de oktobro 1938 la ŝipo, plenumantisian taskon sur Yangzi-rivero, estis atakata de japanaj bombaviadiloj. La soldatoj, sub la gvidado de sia ŝipestro, brave rezistis kontraŭ la malamikoj. La ŝipo Zhongshan, trafite de bomboj en multaj lokoj, fine dronis en la rivero.

La militŝipo per sia heroaĵo montris la patriotisman spiriton de la ĉina nacio kontraŭ la ferocaj invadantoj. Denove montriĝan antaŭan imponecon estas komuna volo de la ĉina popolo. Ĉi-foje ĉ. 500 hom/fojoj laboris subakve entute pli ol 1 000 horojn, forigis pli ol mil tunojn da ŝlimo kaj elakvigis almenaŭ mil objektojn.

Nun la ŝipo estas riparata en ŝipkonstruejo, je 24 km distanca de la loko, kie ĝi dronis. Poste ĝi revenos al Jinkou-urbeto ĉe la loko. La ŝtato jam decidis konstruigi tie eternan bazon por eksponi la ŝipon Zhongshan.

### ĈINA NUMISMATIKA MUZEO

En Pekino estas Ĉina Numismatika Muzeo. Ĝia ekspona halo havas formon de ronda monero kun kvadrata truo, kiu estis ĉefa formo de mono cirkulanta en la malnova Ĉinio. Kiam oni enpaŝas en la mezon de la halo, oni staras ĝuste en truo de la monero.

Kia estas la plej frua ĉina mono? Kiam ĝi naskiĝis? El kio ĝi estis farita? Kiom da moneroj kreis la ĉinaj prauloj en miloj da jaroj? Solvoj de tiuj ĉi demandoj troveblas en la muzeo.

La muzeo konsistas el 5 partoj: Mon-unuigo, Rondaj Moneroj kun Kvadrata Truo, Oraj kaj Arĝentaj Moneroj, Bankoj kaj Monpaperoj, Estanteco kaj Estonteco.

Tie eksponiĝas bronzaĵaj konk-formaj moneroj cirkulantaj en la dinastioj Yin kaj Shang (ĉ. la 16-a jc — 11-a jc a.K.), oraj kaj arĝentaj moneroj en


la fino de la 10-a jc kaj la komenco de la 11-a jc naskiĝis monpapero en Ĉinio, la plej frua en la mondo.

En la muzeo eksponiĝas centoj da specoj da monpaperoj emisiitaj en diversaj historiaj periodoj, inkl. de la dinastioj Song, Jin, Yuan, Ming kaj Qing. Tie vidiĝas ankaŭ *Renminbi* (nuna ĉina mono) kaj parto de la mon-

montaro kuŝas stepo Bayanbulak, ĉirkaŭita de altaj montoj, kiuj baras la atakon de malvarma aero. Sekve, tie regas agrabla klimato, prosperas herboj kaj abundas akvo. La lago kaj marĉo en areo de pli ol mil kvadrataj kilometroj estas idealo por birdoj. Tie vivas pli ol 70 specioj da birdoj, kiaj gruoj, sovaĝaj anseroj kaj mevoj. Precipe en la fino de ĉiu printempo tien reflugas de la Meza Oriento, Suda Azio kaj aliaj lokoj sennombraj cignoj, kiuj faras la lagon regno de cignoj.

Fakuloj konigis, ke tie vivas multaj anseroj kun longo de 1.8 m, kiuj estas la plej grandaj en la anserformaj birdoj de la mondo. Iu ovo de cigno pezas eĉ 427 g. Cigno estas unu el la birdoj, kiuj flugas plej alte. Ĉinaj montgrimpistoj sur Qomolangma vidis cignojn migrantajn supre. De antikve la cignoj impresas, ke ili estas neniam malfidelaj al sia "amo". Ofte vidiĝis, ke iuj cignoj kun ĉagreno staris ĉirkaŭ la ĵus mortintaj kunuloj kaj fine mortis pro malĝojo. Krome cignoj estas disciplinemaj. Ili povas flugi dekmil km. Kiel ili sin orientas kaj distingas la celon? Tio restas ankoraŭ enigmo.

Bayanbulak estas nomata "hejmo de cignoj" pro tio, ke krom la originala geografia medio kaj klimato, la tieaj paŝtistoj bone konas la gravecon de birdoj en la medi-protektado. Ili ne ĉesas cignojn kaj aliajn birdojn nek kolektas iliajn ovojn en la ovoellasa tempo. Nun la ŝtato fondis tie naturparkon. Iam la nombro de cignoj atingis 20 000, kio altiris al si multajn turistojn ĉinajn kaj alilandajn.



En la numismatika muzeo

formo de konko uzataj en la periodo Militantaj Regnoj (476-221 a.K.), plugilformaj, glavformaj kaj ringformaj moneroj. Tie vidiĝas ankaŭ rondaj moneroj "Banliang" kun kvadrata truo emisiitaj post kiam Ĉinio estis unuigita de la Unua Imperiestro de Qindinastio (246-210 a.K. sur la trono). Tiuspeca monero poste transformiĝis en monerojn Wuzhu kaj Kaiyuantongbao, la ĉefa formo en la antikva Ĉinio.

La kupraj kaj feraj moneroj uzataj en la antikva Ĉinio estis peza ŝarĝo por komercistoj en longdistanca transportado. En

paperoj emisiitaj de ĉinaj registaroj, komercaj kaj privataj bankoj.

La ĉina mono koncentre spegulas la numismatikajn trajtojn de la Oriento, kaj samtempe la enhavojn de la politika kaj ekonomia evoluo de Ĉinio. En la muzeo establita de la Popola Banko de Ĉinio eksponiĝas ankaŭ oraj kaj arĝentaj moneroj emisiitaj en diversaj periodoj de la nova Ĉinio, el kiuj estas multaj valoraj kaj fajnaj.

### "CIGNA LAGO" EN PROFUNDO DE TIANSHAN

En profundo de Tianshan-

# LUMO POR BLINDULOJ

## — Pri japana blindulino en Ĉinio



Yoko Aoki verkas en brajlo.

**E**N granda pura salono, sur unu muro pendas diversaj japanstilaj pendaĵoj, en angulo de alia muro estas kiraso de antikva japana soldato. Tie estas ĉina hejmo de japana blindulino Yoko Aoki, ankaŭ ŝia laborloko — Tianjin-a Japanlingva Lernejo por Blinduloj.

### LA UNUA PAŜO

Influante de la ĉina klasika kulturo, Yoko Aoki tre sopiris Ĉinion dum studado en universitato de Japanio. Ŝi rimarkis, ke per sia progresinta edukado de

blinduloj kaj siaj avangardaj instruaj instalaĵoj Japanio altiris al si blindajn studentojn el multaj landoj kaj regionoj, escepte de Ĉinio. Kiam ŝi fariĝis eduka magistro de la Ŝtata Universitato de Nov-Jorko, ŝi decidis helpi ĉinajn blindulojn lerni la japanan lingvon, koni Japanion kaj akiri kapablon servi al la socio.

Por realigi la deziron, unue ŝi devis lerni la ĉinan lingvon. Aŭguste de 1993 ŝi ekstudis en la Tianjin-a Fremdlingva Instituto. Post unu jaro ŝi okupis la unuan lokon per 9.86 poentoj en la 4-a

Konkurso de Ĉinlingva Parolado de Alilandaj Amikoj en Tianjin. Ŝi ĝojis pro sia sukceso. Ŝi opiniis, ke nur post posedo de la ĉina lingvo ŝi havos kapablon instrui la japanan lingvon al ĉinaj blinduloj.

### INSTRUADO

Yoko Aoki bone konis la aktualan situacion de malriĉaj blinduloj. Ŝi intencis fondi senpagan lernejon kun senpaga pensio, kiu malpezigas la ŝarĝon de lernantoj. Pro tio, Yoko Aoki trifoje revenis Japanion por prepari



instruajn materialojn kaj fonduson. Ŝia patro ne nur subtenis ŝin per sia ŝparita mono, sed ankaŭ helpis ŝin fondi la Edukan Asocion de Aziaj Blinduloj por kolekti edukajn fonduson. Nun la asocio jam havas 370 membrojn, kiuj plejparte estas vidpovaj. Dank' al ilia klopodo iuj japanaj kompanioj donacis monon kaj objektojn. Iu biblioteko de Tokio donacis al ili diversajn brajlajn librojn en valoro de 200 mil juanoj.

Diversaj rondoj de Tianjin helpis ŝin fondi la lernejon. La 12-an de marto 1995 ekfunkciis la Tianjin-a Japanlingva Lernejo por Blinduloj. Ĝi fariĝis ponto inter ĉinaj kaj japanaj blinduloj kaj fenestro por ĉinaj blinduloj koni la mondon.

La lernejo pli similas al familio. Krom kompili instruajn materialojn kaj fari korespondadon, ĉiutage ŝi interparolas kun la lernantoj en la japana lingvo, por ke ili havu la vivkutimon kaj pensmanieron de japanoj. Ŝi postulas, ke ili plenumu sian propran aferon sendepende, kaj instruas al ili uzi forkon kaj tranĉilon, alkudri butonon, senŝeligi pomon...

Yoko Aoki opinias, ke blinduloj devas ne nur esti sin mem, sed ankaŭ esti sanaj. La lernejo instruas flugpilkon kaj tablotenison kaj havas teamon de flugpilko. Ŝi celas, ke ili starigu memfidon al memstara vivo. Laŭ sia sperto ŝi kredas, ke blinduloj povas sukcesi.

## LUMIGI ILIAN KORON

La spirito de Yoko Aoki lumigis la koron de pli ol 50 lernantoj. En la pasintaj du jaroj tri el ili ricevis stipendion de ICB de Japanio kaj studis en tiu lando.

Li Yanyan blindiĝis, kiam li studis en la 3-a klaso de universitato. Reveninte la hejmlokon, li preskaŭ perdis la kuragon vivi. Aŭdinte tion, Yoko Aoki tuj ren-

devuis kun li, helpis lin starigi memfidon al vivo kaj akceptis lin kiel la unuan korespondan lernanton. Kiam li posedis iom da japana lingvo, ŝi pagis por lia lernado en Tianjin por unu monato. Post nelonge li sukcesis en enira ekzameno de japana lernejo por blinduloj kaj komencis studi tie senpage.

Guo Lihua, instruistino de elementa lernejo, forlasis la podion pro blindiĝo. Ŝi devigite divorcis. Kiam ŝi trovis la lernejon de Yoko Aoki, varbado jam finiĝis. Dufoje ŝi volis sin mortigi pro malespero. Aŭdinte tion, Yoko Aoki akceptis ŝin escepte. Post duonjaro ili ambaŭ estis premiitaj en la konkurso de par-

kiuj gesinjoroj Li Shengyan pli zorgis pri ŝi. Kiam ŝi studis en la fremdlingva instituto, ili helpis ŝin iri al la instituto kaj reveni hejmen, prizorgante ŝin en la vivo; en libera tempo ili akompanis ŝin al restoracio por ĝui famajn pladojn de Tianjin, kune kun ŝi kantis, naĝis, sketis kaj turisme vojaĝis. Yoko Aoki nomas ilin "ĉinaj gepatroj", kaj ĉi tiuj donis al ŝi la ĉinan karesan nomon "Yangyang". La Tianjin-a Japanlingva Lernejo por Blinduloj estas frukto de ilia kunlaboro. La "patro" estas direktoro, kaj la "patrino" zorgas pri ĉiuj aliaj detaloj. Ili senpage laboras kiel Yangyang. La patri- no ŝnurligis pli ol 170 japanajn



Yoko Aoki kaj ŝiaj ĉinaj gepatroj

olado de la ĉina kaj japana lingvoj, nome "Voĉo de Amikeco inter Ĉinio kaj Japanio", okazigita de Radio Tianjin, kaj Guo estis dungita kiel helpinstruistino de la lernejo. Nun ŝi estis akceptita en lernejon por blinduloj dependan de japana universitato.

## ĈINAJ GEPATROJ

La ago de Yoko Aoki ricevis subtenon de multaj homoj, inter

pendaĵojn, kiujn Yangyang kolektis. Tiuj ŝtofaj pupoj kaj bestoj estas ne nur ŝiaj ludiloj, sed ankaŭ demonstraĵoj palpeblaj por lernantoj. Inter ili tri kunigitaj simioj plej plaĉas al ŝi. Unu permane kovras la okulojn, alia la orelojn kaj tria la buŝon. Ŝi klarigis: "Tio signifas, ke vi ne rigardu, ne aŭskultu nek diru kion vi ne devas!" Parolante, ŝi montriĝis iom naiva. ■

CHEN YA:

# Suĉigu al la beboj patrinan lakton

**A**NTAŬE en Ĉinio la beboj nove naskitaj en hospitalo estis tuj portitaj al beboĉambro, kaj la junaj patrinoj, ĝenerale dirite, mem suĉigis sian bebon nur 24 horojn post sia nasko. Post kelka tempo iuj patrinoj suĉigis al sia bebo pulvoran lakton. En la kamparo la akuŝintinoj, kiuj naskis en sia hejmo, ne volis tuj suĉigi sian bebon, opiniante, ke la plej frua lakto ne estas higiena. La graveco de la patrina lakto ne estis komprenata. El tio rezultis, ke nur malpli ol 10% de la patrinoj suĉigis al sia bebo sian lakton en la grandaj urboj, kiaj Pekino kaj Ŝanhajo, fine de la 80-aj jaroj.

En la pasintaj dek jaroj pli kaj pli multaj ĉinaj ginekologi-obstetrikaj kaj sociologiaj laborantoj, samkiel iliaj alilandaj kolegoj, defiis la malnovan kutimon kaj proponis al la beboj la patrinan lakton. Ili opinias, ke la patrina lakto estas tre utila al sano de la beboj. Por proponi suĉigadon de la patrina lakto junio de 1992 la Monda San-Organizo kaj la Infana Fonduso de UN kune proponis fondi beboamajn hospitalojn sur la terglobo, pledante por frua eksuĉigo kaj kunloĝado de la patrino kaj ŝia bebo. Decembre de la sama jaro 21 hospitaloj de Ĉinio, trapasinte la internacian ekspertizon, fariĝis la unuaj beboamaj hospitaloj en Ĉinio.

La Ginekologi-obstetrika Hospitalo Haidian, Pekino, estas unu el la beboamaj hospitaloj de Ĉinio. Tie ĉiuj ĝiaj 150 litoj estas destinitaj por kunloĝado de la akuŝintino kaj ŝia bebo. Tie mi konatigis kun 24-jara patrino Zhang. Duonhoron post sia nasko ŝi jam komencis suĉigi al la bebo sian lakton, helpate de flegistino. Ekde tiam ŝi neniam disiĝis de sia bebo, escepte la laŭplanan imunigon kaj banon de la bebo. "Mi sentas senliman feliĉon, prenante la bebon en mia sino," diris la juna patrino kun ĝojo, "Kiam ĝia buŝeto tuŝas min, mi konscias, kiom mi ĝin amas. Dum preakuŝa ekzameno kuracistoj donis al ni lecionon pri graveco de la patrina lakto. Mi

opinias, ke suĉigado de la bebo estas plej simpla kaj natura afero."

La estrino de la hospitalo, 53-jara Bai Yanqing, diris: "Kiel bone, se estus beboama hospitalo, kiam mi naskis infanon. Nur ok tagojn post mia nasko mi vidis mian bebon. Ĉiufoje, kiam mi aŭdis ploradon el la infanetejo, mi nevole supozis, ke tio eble estis plorado de mia infano." Laŭ ŝi suĉigado de la patrina lakto povas intimigi la patrinon kaj ŝian infanon. La patrina lakto estas la plej bona nutraĵo, kiu utilas al la beboj ne nur por pliigi la imunecon, preventi malsanojn de digesta kaj spira sistemoj, sed ankaŭ por forigi la lacon de la akuŝintino.

En la nomita hospitalo estas malpermesate suĉi-



Gepatroj kaj ilia bebo

gi al beboj surogaton de lakto kaj trinkaĵon, escepte de la kuracista konsento. La hospitalo malpermesas ankaŭ suĉigi al la beboj ajnan suĉilon kiel konsolaĵon, tamen la tempo kaj fojoj de suĉigado ne estas limigitaj. Por ke la patrino kaj bebo havu sekuran kaj higienan medion, la ĉambro estas seninfektigita ĉiutage. Por ke la patrino kaj bebo estu bone flegata, ĉiuj kuracistoj kaj flegistinoj ricevis pli-ol-18-horan trejnadon pri suĉigado de la patrina lakto.

Nun en Ĉinio laboras ĉ. 3 000 beboamaj hospitaloj. Pli kaj pli multe da beboj suĉas patrinan lakton. Ni prenu Pekinon kiel ekzemplon. En 1988 10% de la malpli-ol-4-monataj beboj de la urbo suĉis patrinan lakton ekskluzive kaj la procentaĵo kreskis al 61% en la fino de 1994. Ĉinio fondis beboamajn hospitalojn, ne nur en urboj, sed ankaŭ en kamparo, ĉar tiaj hospitaloj ne postulas multe da luksaj instalaĵoj. Por ili plej grave estas disvastigi suĉigadon de la patrina lakto kaj doni bonan servon. Ili certe estos bonvenaj al la tuta socio. ■

LIU YING:

# RIĈA RIKOLTO EN DEZERTO



Yan Zhezhu

**Y**AN Zhezhu (Jan Ĝegu) kaj liaj kamaradoj kulturis rizon en dezerto kaj rikoltis 10 500 kg ĉiuhektare. Verŝajne tio estas neimagebla, tamen tio estas fakto en dezerto de la Interna Mongolio.

Yan estas vicprofesoro esploristo de la Agronomia Instituto de Zhelim, Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio. Li estas korenciano, naskiĝinta en Yanbian de Jilin-provinco. En 1991, kiam li kun sia familio forlasis la naskiĝlokon, liaj multaj amikoj ne komprenis lin, ĉar la loko, kien li veturis labori, estis malriĉa. Tamen Yan iris tien ĝuste pro ĝia malriĉeco. Jam en la tagoj, kiam li laboris kiel teknika direktanto en agrokultura produktado en Zhelim, li estis korpemita de la malriĉeco de la tieaj loĝantoj kaj seriozeco de la dezerto: Ie, 60% de la agroj estis englutitaj de flusablo kaj la loĝantoj povis manĝi nur maizon. Li pensis: "Kiel bone estos, se oni utiligos la dezerton por produkti rizon." Ĝuste pro tio li decidis labori en la dezerto.

La ideo de Yan ne estis senbaza. Li sciis, ke kvankam Zhelim areoj 2 270 000 hektarojn da dezerta tero, tamen ĝi riĉas je subtera akvo. Komprenible, ne estas facile realigi lian ideon. En Zhelim li

pasigis sian unuan printempon en dezerto. Tie mankis legomoj. Li loĝis en likanta domo. Por ŝpari monon li kaj lia edzino mem transportis plastan membranon, kemian sterkon kaj insekticidon al malproksima eksperimenta parcelo.

Finfine Yan kaj lia kamarado Huang Xuewen (Hŭang Ŝjueŭen), laboranto el la Dezertologia Instituto de Lanzhou, Gansu-provinco, sub la Ĉina Akademio de Sciencoj, akiris sukceson. Per tekniko de grund-manka kulturado en la dezerto, kie estas abunda akvo kaj alta temperaturo, ili faris sur la aer-tralasa sablo la tutan produkto-procedon: sterni plastan membranon kontraŭ likado, kulturis rizidojn kaj transplantis plantidojn. Ili komencis tiun eksperimenton en 1992 kaj post 2 jaroj sur la 1.5 hektaroj da rizkampoj en la dezerto ili rikoltis 14 800 kg da rizo. En 1995 oni disvastigis tiun teknikon en la gubernio Naiman: ebenigi la sablajn lokojn, fosi putojn kaj sterni plastan membranon. Oni kulturis rizidojn marte, transplantis ilin maje kaj en septembro maturiĝis la spikoj sur centoj da hektaroj da rizkampoj en la dezerto, kie neniam antaŭe vidiĝis plantoj. La tieaj loĝantoj, kiuj neniam antaŭe manĝis rizon, unufoje havigis al si bongustan rizaĵon. Ili kortusiĝis ĝis

larmoj.

Aplikante la riz-kulturan teknikon inventitan de Yan Zhezhu kaj liaj kamaradoj, oni laŭbezone reguligas sterkon, akvon kaj aeron, tiel ke oni povas plene evolvi la latentan produktan povon de rizo. Liberaj je malfavoraj grundaj kondiĉoj, oni povas apliki la teknikon taŭgan ne nur por akvoriĉaj sabla kampo, dezerto kaj plaĝo, sed ankaŭ por alkala tero kaj tero kun abundo da karbopulvoro aŭ skorio. Dank' al apliko de la nova tekniko oni malfermis novan vojon por pliigi agrojn kaj pliprodukti grenon.

Nun Yan kaj liaj kamaradoj klopodas por disvastigi sian teknikon. Ankaŭ tio estas malfacila. Por ke la skrupulaj kamparanoj akceptu la novan teknikon, la loka registaro asignis monon al ilia scienca esplorado kaj organizis la kamparanojn rigardi la eksperimentan parcelon de Yan Zhezhu kaj fari tie interkonsiliĝon. La konvinkitaj kamparanoj sukcesis en rizkulturado en la dezerto kaj sin liberigis el malriĉeco. Tiam Yan Zhezhu ekhavis novan planon. Li jam esploris ĉiujn dezertojn de la Interna Mongolio por disvastigi tie sian teknikon. Nun li estas preta apliki sian teknikon ankaŭ en Xinjiang (Ŝingĵang) kaj Gansu. ■





## Granda stelo en la korea Esperantujo falas

S-ro Hajpin LI, honora membro de Universala Esperanto-Asocio kaj konsilanto de Korea Esperanto-Asocio, forpasis en la 24-a de februaro 1997.

Li naskiĝis en la 2-a de februaro 1917. Hajpin LI estas plumnomo de Yi Chaehyon, nacisava patrioto kontraŭ japana militarismo kaj vortaristo. En 1935 li eklernis Esperanton de Elpin en Ĉinio. En 1937 li eldonis la revuon "Nove Baktio", kiu aperis plurnumere ankaŭ en Koreio en 1949 kaj 1950. Li kunlaboris kun la revuo "Orienta Kuriero".

Li faris aktivan literaturan agadon post la korea milito. Liaj originalaj prozaĵoj "Mia Vivo", "Neforgesebla Figuro", "Benita

Vespero"... liaj tradukitaj noveletoj "Klava Monto" de KIM Tongin, "Eĥo de OH Young-su", "La Tria Tipo de Homo" de AN Sugil... En oktobro 1977 li eldonis poŝlibron "Eseo — Tra la Kamparo", kaj poste en julio 1987 kolekto de liaj verkoj eldoniĝis sub la titolo "Koreaj Noveloj, Eseoj kaj Popolrakontoj Originalaj kaj Tradukitaj".

Lia plej sindonema kontribuaĵo estas kompilado kaj eldonado de Esperanta-Korea Vortaro en 1969 kaj Korea Esperanta Vortaro en 1983. Li estas alte taksita kiel plej granda Esperanta literaturisto en la korea Esperantujo.

## KORESPONDI DEZIRAS

**Tarifo: Du internaciaj respondkuponoj por kvin vortoj aŭ mallongigoj. Esp-organizoj kaj niaj perantoj ĝuas 50% da rabato. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.**

\* S-ro Duan Yongxing, estro de la Muzika Lernejo Nie Er, deziras kontakti kun tutmondaj esperantistaj muzikistoj, precipe tiuj el Orienta Eŭropo. Adr.: 31, Xiba Xincun, 650031 Kunming, Yunnan, Ĉinio.

\* Wang Mingbo dez. kor. tm. pri ĉiuj temoj. Adr.: Jianzhu Gongcheng Gongsi, Di Er Jichuangchang, 161005 Qiqihar, Heilongjiang, Ĉinio.

\* Chen Baokuan, 32-j. fraŭlo, dez. kor. tm. pri ĉiuj temoj, pretas vojaĝi kun prezento de uŝuo (tradicia ĉina luktarto) kaj masaĝo kaj deziras ricevi helpon kaj kunlaboron de esperantistoj tiurilate. Adr.: 24, Nan 15 Street, Daowaiqu, 150026 Harbin, Heilongjiang, Ĉinio.

\* H.F.M.Saĝo, 11-j. knabo, dez. kor. tm. pri ĉiuj temoj, precipe lingvoj, poemoj, muzikoj Esperante, angle, ruse, germane, hispane, japane, vjetname, hinde aŭ arabe. Adr.: 22-901 Ln, E. Xinglong St. W. Dongfeng Rd. 510180 Guangzhou, Guangdong, Ĉinio.

\* Anoj de Esperanto-Klubo volas kor. kun

amikoj el la mondo. Adr.: Artur Stepien, ul. Kollataja 10/22, 28-200 Staszow, Pollando.

\* Aivaras Liepinis, 35-j. poŝt oficisto, dez. kor. tm. kaj interŝanĝi pm., pk., poŝtstampojn kaj glumarkojn pri Esperanto. Adr.: Gasĉiunai, LT-5151, Joniskio raj., Litovio.

\* Vita Belko, 14-j. knabino, interesiĝas pri muziko, sportoj kaj literaturo. Adr.: Str. Sanatornaja No 23-33, 354008 Soĉi, Rusio.

A 20 entuziasmaj geknaboj, 10-11-j., serĉas kontakton kun samaĝuloj el diversaj landoj. Adr.: Gimnazio "C. Cerkovski", Esperanto grupo "Verdaj steletoj", 5180 Polski Trambes, Bulgario.

\* Sigita Piliponyte, 13-j. lernantino, volas korespondi kun gejunuloj el la tuta mondo. Adr.: A.P. Kavoliuko 3-93, LT-2050 Vilnius, Litovio.

\* Lernantinoj de 5-a klaso dez. kor. pri lernado. Adr.: Marina, Helena, Alina, Eljvira, Interklubo "E-to" Juna grupo, u. Nijnevartovsk-6, 626440 Rusio.


\* Maria Jagiello-Dangow, 66-j., dez. ligi seriozajn korespondkontaktojn kun gesamideanoj el diversaj landoj. Adr.: u. Styczynskiego 37m. 6, 44-100 Gliwice, Pollando.

\* S-ro Dragan Novakovic, 59-j. libera komercisto, volas korespondi kun ĉinaj fraŭlinoj. Li baldaŭ vizitos Ĉinion. Skribu al: M.P.O. Box 2548 Vancouver, B.C. V6B 3W8, Kanado.

# TAIHU-LAGO



Taihu-lago kun areo de 2 400 kvadrataj kilometroj estas unu el la kvin grandaj sensalaj lagoj de Ĉinio, en suda Jiangsu-provinco. Ĝi formiĝis el sedimentaĵo en la malsupra baseno de Yangzi- kaj Qiantang-riveroj, kiu fermis pratempan golfon. Ĉe la lago staras montpintoj kaj en la lago kuŝas insuloj. Kun konstruaĵoj ĉirkaŭe la lago havas pejzaĝon pli ĉarman. La poŝtmarko-serio el kvin pecoj estis emisiita de la Poŝta kaj Telekomunika Ministerio de Ĉinio en 1995.



太湖 · 包孕吴越

La Placo de Herooj en Budapeŝto  
de ANNAMARIA KALLOS (Rumanio)



Bieno en Skanio, suda Svedio  
de MALTE MARKHEDEN (Svedio)



ISSN 0032-4361

